

revuo

esperanto

junio 1966

59-a jaro

n-ro 727 (6)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 101 Nur "grupo da homoj" (Red.)
Juna branĉo de TEJO (Bakker)
- 102 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado
Peticio jam prezentita al japana parlamento
- 103 Esperanto en japana parlamento
- 104 La Esperanto-Inform-Centro Novjorka (Starr)
- 106 La kvar unuaj jaroj (Markarian)
- 108 "Trateksita de multaj katastrofoj" (Szathmári)
- 110 CED
- 111 Lastaj informoj pri la Lerneja Konferenco
- 112 Unu alfabeto por afrikaj lingvoj
Recenzoj
- 113 Ricevitaj eldonaĵoj
Leteroj
Nekrologoj Blöndal, Deubler, Segal,
Veenendaal
- 114 Mallongaj novaĵoj
- 116 La flugvojaĝo de UEA al Tel Aviv, 1967
- 117 51-a Universala Kongreso, Budapeŝto, 1966
- 118 La Juna Vivo
- 119 En la grupoj
Esperanto en radio
Oficiala informilo n-ro 391
- 120 La internaciaj konkursoj 1966
Anoncetoj

kovrila bildo

Lajos Tárkony, aŭtoro de "Soifo", intervjuata de Valéria Szabó ĉe Radio Budapeŝto. (Foto: Korniss péter) Vidu p. 119

bildojn liveris

- 104 Jerry Soalt
- 114 (Supre) P. Böhm
- 116 (kaj 117) "Welt auf Reisen"

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1966): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 83 landoj.

Estrararo de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

"Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multe pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popolo havas vivon multe pli garantiitan kaj neestingeblan, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj."

Kiam Zamenhof skribis al Kofman la suprajn liniojn en 1901, temis ankoraŭ nur pri profetaĵo. Hodiaŭ tiu "cento da homoj" jam ekzistas, la Internacia Lingvo pluvivas per familia heredo tiel same, kiel ĉiu alia lingvo vivanta. En multaj familioj, ofte fonditaj per internacia geedziĝo, Esperanto servas hodiaŭ kiel sola aŭ ĉefa hejma lingvo.

Pioniroj sur tiu kampo estis la familioj Gastón en Hispanujo kaj Butler en Britujo. Precizaj informoj pri tiu internacia "popolo"

estas tre malfacile riceveblaj: la tasko estas tute alia, ol tiu de registaraj statistikejoj! Enketo de CED en 1957 indikis, ke tiam almenaŭ 64 personoj denaske parolis Esperanton, sed tiam nur pri 25 troviĝis sufiĉe konkretaj detaloj por aperigo en la listo, kiun ekde 1958 enhavas la Jarlibro de UEA. La listo por 1966 jam kreskis ĝis 95 nomoj.

Multe kontribuis al la kuraĝigo de tiaj familioj la infankongresetoj, kiuj jam de 1956 estasigitaj al la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Gravegan rolon ludis ankaŭ la organo "Bulteno Gepatra", kiu de post 1946 ebligis interŝanĝon de spertoj, komunan diskuton pri familiaj problemoj, publikigon de infanliteraturo, ktp. Ĝia malapero en 1963 forte sentigis, kaj ĝis nun ne aperis anstataŭanto. La artikolo de s-ro R. Markarian sur p. 106 de ĉi tiu revuo signas nian intencon, estonte dediĉi pli grandan atenton al tiu grupo da homoj, "pli grava ol milionoj da aliaj". Red.

JUNA BRANĈO DE TEJO

Jam pasis preskaŭ du jaroj, post kiam nia jargono pliriĉiĝis per la vorto "NEJO-komisiono". Tiu komisiono fondiĝis dum la 20-a IJK en Amsterdam, 1964, kiel unu el la komisionoj de TEJO kaj de STELO kun la celo puŝi TEJO kaj STELO el ilia obskura angulo en la rondon de la Ne-Esperantistaj Junularaj Organizoj (NEJOj).

La enkonduko de Esperanto nur sukcesos, se la publiko vidos ĝian rektan utilon por siaj propraj celoj. En la ĉiutaga eksterorganiza vivo Esperanto ne jam donas tiun utilon. Tamen, interne de iuj apartaj sociaj grupoj (ekzemple NEJOj) la situacio povas esti alia. Ju pli la NEJO estas en si fermita rondo kun ju pli da internaciaj kontaktoj inter la membroj, kaj ju pli tiuj membroj restas konstante la samaj, des pli la kondiĉoj favoras utilan uzon de Esperanto interne de tia NEJO. Krome rolas aliaj faktoroj, ekz. la speco de kontaktoj, la jama lingvoscio de la membroj, ktp. Ni volas atingi, ke ĉiu NEJO, ĉiu en siaj apartaj cirkonstancoj, konsideru objekte sian lingvan problemon kaj la plej racia(j)n solvo(j)n. Se sur tiu bazo NEJO decidis, ke Esperanto estas la plej taŭga solvo (por parto aŭ por la tuto de ĝiaj interrilatoj), la uzo de Esperanto baziĝas sur firma fundamento, nome: tiu de la agnoskita utilo. La pozicio de Esperanto tiam ne dependas de hazarda favoro de tiu aŭ alia kaj de daŭra zorgado fare de esperantistoj por konservi la akiritan pozicion. La konscio, ke Esperanto servas la propran profiton, fidiinde kaj aŭtomate garantios ĝian daŭran uzon.

Konkretigante tiun bazan ideon la laborplano antaŭvidas koheran evoluon de la NEJO-laboro. Kelkaj eroj el ĝi estas:

- daŭra flego de eksteraj rilatoj, kiuj konsistas el: informado, informiĝado, reprezentado, edukado.
- daŭra pligrandigo de niaj propraj spertoj kaj scioj per studado, partopreno en kursoj, ktp., por ke ni povu elpaŝi je konvena momento *prezentante* niajn servojn al aliaj, anstataŭ petante servojn de aliaj.
- financado de nia laboro per mono el ekster-esperantistaj fontoj.
- publikaj aranĝoj, por pligrandigi nian reputacion.
- kunigo kaj edukado de elita NEJO-komisiono konsistanta el grupeto da seriozaj, entuziasmaj homoj el Nord-okcidenta Eŭropo (pro facila kunvenado), kaj reto da kunlaborantoj por surloka reprezentado kaj specifaj taskoj.

La NEJO-komisiono laboras cel-konscie laŭ sia plena kapablo. Ĝi ankaŭ konscias, ke fine ekzistas nur unu mezurilo por ĝia sukceso: la nombro de NEJOj uzantaj Esperanton. Kiu ne fortimiĝas de tiel ambicia celo, relegu la lastan supran alineon: seriozaj, entuziasmaj kunlaborantoj, kiuj emas diskuti, sugesti, kritiki, spertiĝi pri la NEJO-laboro — jen nia plej granda bezono!

H. Bakker,
estrarano de TEJO pri NEJOj.

esperanto
junio 1966



LASTAJ PROGRESOJ DE LA SUBSKRIBO-KOLEKTADO

Ĝis la 11-a de majo atingis la Centran Oficejon subskriboj de 775 688 individuoj kaj de 2 746 organizaĵoj (korektita cifero) kun ĉ. 61 milionoj da membroj, el entute 67 landoj.

Intertempe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj konfirmigis sian pretecon, akcepti aŭ akceptigi malgrandan delegitaron de UEA por la solena transdono de la Propono en oktobro de la nuna jaro. Li samtempe esprimis kontenton pro la -diverseco kaj vasteco de la kontribuoj de UEA al la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Al la jam tre impona listo de eminentuloj subskribintaj aliĝis granda nombro el Hungarujo: Sándor Barcs, membro de la Prezida Konsilo de la Respubliko, ĉefdirektoro de la hungara novaĵagentejo, prezidanto de la Hungara Ĵurnalista Asocio, vicprezidanto de la Eŭropa Futbal-Asocio (UEFA); s-ino Józsefné Nagy, ministro pri malpeza industrio; József Veres, ministro pri laboro; Ferenc Nezvál, ministro pri justico; Péter Veres, eks-ministro

pri defendo; kvar vic-ministroj pri malpeza industrio; Lajos Huber, prezidanto de la Sindikato de Ŝtataj Oficistoj; Miklós Vida, prezidanto de la parlamentanoj en Budapeŝto; Gyula Egri, prezidanto de la landa konsilantaro de sport-unuiĝoj, prezidanto de la Hungara Olimpika Komitato; 23 akademianoj, inter ili 21 kunlaborantoj de la Lingvosciencia Instituto; la ĉefredaktoroj de "Népsport" (200 000 ekz.), "Vivo kaj scienco" (180 000 ekz.) kaj la oficiala organo de la Hungara Ĵurnalista Asocio; kaj multaj aliaj, precipe ĵurnalistoj kaj universitatanoj.

Subskribis ankaŭ la Hungara Turisma Asocio (80 000 membroj).

Laŭ-kategoria analizo de la unuaj 565 000 individuaj subskriboj montras: 76 membrojn de registaroj, 992 parlamentanojn, 643 lingvistojn kaj filologojn. Certe la ciferoj estas nun jam multe pli altaj.

Lasta alvoko: Nepre ĉiuj subskriboj atingu la Centran Oficejon **antaŭ** la fino de julio!

PETICIO JAM PREZENTITA AL JAPANA PARLAMENTO

KUNAGIS ESPERANTO-PROPAGANDA ASOCIO KAJ JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Paralele kun la kampanjo por la Propono de UEA al Unuiĝintaj Nacioj, Esperanto-Propaganda Asocio (EPA, de Oomoto) kaj Japana Esperanto-Instituto decidis aparte peticii la Japanan Parlamenton pri instruado de Esperanto en lernejoj. Jen ilia koncizigita raporto:

"En la lasta somero, kiam ni antaŭvidis ke la subskribkolektado por EPA-Peticio al la Japana Parlamento atingos la nombron de pli ol 250 000, unu parlamentano jam konsilis favore al ni, ke ni prezentu la kolekton de foliaroj ĉe la Ordinara Sesio de la Parlamento pere de kiel eble plej multaj (almenaŭ 15-20) parlamentanoj, subtenantaj la Peticion. Tri tagojn antaŭ la Sesio, niaj reprezentantoj I. Hino kaj N. Esumi forveturis al Tokio kun la speciala komisiono por tio. S-roj S. Kubo kaj H. Janagida, anoj de la Socialista Partio, tuj afable akceptis niajn reprezentantojn kaj konsentis al ili aranĝi la subtenon per ĉ. 30 sampartianoj. Aliflanke, s-ro K. Tamaki, ano de la Demokrat-sociala Partio, ankaŭ montris al ili grandan favoron: li promesis ke li elzorgos 7 subtenantojn el sia partio.

"Kuraĝigite de la favora raporto de niaj reprezentantoj pri ties agado en Tokio, kaj konsiderante ankoraŭ la gravan taskon konvinki la Edukan Komisionon kaj aliajn, EPA decidis eldoni libreton, "Kio estas Esperanto" (70 p.; formato: 12.5 x 18 cm.), kiu estas la japana traduko de "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo Esperanto", speciala eldono de CED kaj UEA, kun pluraj aldonoj faritaj de la tradukinto J. Umeda. Ni presis ĝin en 4 000 ekzemple-

roj ne nur por disdoni al ĉiuj membroj de la Ĉambro de Deputitoj kaj de la Ĉambro de Konsilantoj, sed ankaŭ por ĝia utiligo ĉe la ne-esperantista publiko, al kiu ni vekis la intereson pri Esperanto per la vaste disvendata libro "Mia Vojaĝo en Esperantujo" de Kiotaro Deguĉi.

"La 8-an de februaro, 1966, N. Esumi sola veturis al Tokio por antaŭprepari la renkontiĝon kun la Prezidanto de la supre menciita Eduka Komisiono kaj aliaj influhavaj personoj. Kelkajn tagojn poste I. Hino kaj J. Umeda sekvis por helpi lin en Tokio. La triopo akiris ne tiel malfacile la 10 subtenantojn el inter la dudeko da Komisionanoj, ĉar ili jam havis favoran opinion por Esperanto kaj eĉ tiuj, kiuj ne konsentis subteni la Peticion, principe estis simpatiaj kaj favoraj al la Internacia Lingvo.

"Matene de la 19-a, ili do forlasis Tokion, konfirmante la fakton ke la kolekto da foliaroj estas jam submetita al la Komitato de Edukaj Aferoj, kiu konsistas el la superpartiaj parlamentanoj. Ni povas esti certaj, ke la Parlamento antaŭ la fermiĝo de la nuna Sesio en majo akceptos la Subskribkolekton, kiam oni prezentos ĝin en la nomo de la sume 47 deputitoj!

"Estas memkompreneble, ke la leĝigo pri Esperantoinstruado estas afero, kiu bezonas ankoraŭ jarojn da nia konstanta klopodado por plue interesi pri Esperanto ne nur la parlamentanojn, sed ankaŭ la vastan publikon. Tamen, la unua paŝo por tio en la Parlamento jam estas metita!"

Ekstrakto el la "Protokolo N-ro 4 de la Unua Fakkunsido de la Buĝeta Komitato en la Ĉambro de Deputitoj, ĉe la 51-a Ordinara Sesio de la Japana Parlamento, la 28-an de februaro, 1966".

En la supra protokolo, eldonita la 4-an de marto, 1966, de la Oficejo de la Ĉambro de Deputitoj, okazis interesa debato pri la Lingvo Internacia. Deputito de la prefektujo Hukuoka, s-ro Haruji Tahara, apartenas al la Socialista Partio. Li faris interpelacion pri 3 punktoj en la nomita Fakkunsido, kiu pritraktis buĝeton koncerne la Ministerion pri Edukado; ni prezentas al niaj legantoj nur parton de la detala protokolo, kie temas pri enkonduko de Esperanto en mezlerneja edukado.

En la protokolo ĉi-sube koncizige tradukita, TAHARA estas socialista deputito, SAITŌ, komisaro de la registaro, kaj NAKAMURA, Ministro pri Edukaj Aferoj.

☆

TAHARA: La ministro (Nakamura) en sia ĵusa respondo esprimis, kiel mi konjektis, ke en sia programo li antaŭvidas la latinigon de la japanlingva skribado; ni tamen opinias tion ankoraŭ tro frua, se per unu salto oni irus ĝis la latinigo. Nu, troviĝas nun kiel interlingvo la internacia lingvo nomata Esperanto. La tutan tempon ekde la altlernejo ĝis la fino de l' universitato, oni kvazaŭ ĉasmordas la fremdajn lingvojn: la anglan de Anglujo aŭ tiun de Usono, la germanan de Germanujo kaj la francan de Francujo, ktp. Kaj la tuta klopodo en la plej multaj okazoj montriĝas vana kun la rezultato, ke oni scias almenaŭ iom pri ĉiu sed mastras neniun el la lingvoj. Kontraŭe, la Esperanto de d-ro Zamenhof.... estas facila, kaj tial mi proponas, ke ĝi estu instruata kiel deviga leciono en la mezlernejo, por krei tian situacion, ekzemple, ke ĉiuj vizitantoj al Japanujo facile povas vojaĝi enlande, se ili ankaŭ scipovas Esperanton.... Se Japanujo adoptus Esperanton kaj la mondo ekscius tion, tiam la vojo rapide malfermiĝus al la mondo por koni la japanan kulturon.... En tiu senco ni estas malkontentaj kontraŭ tio, ke oni nun instruas la anglan lingvon ekde la mezlernejo. Ĉar mi studis en universitatoj de Usono, mi plimalpli scias la anglan; mi tamen — nun vidante la amare bedaŭrindajn statojn, ekzemple, la tro oftan misuzon de iaj anglaj lingvaĵoj en la disaŭdigo de la televido kaj radio, — devas eĉ dubi, ĉu Japanujo estas sendependa regno aŭ ne. El tio sekvas, ke ni volas rekomendi, ke la lernado de tiuj naciaj lingvoj, kiuj iam ekestis kaj evoluis, respektive, en sia lando, estu limigita nur al la kazoj de alta lernejo kaj de faka edukado; ke por la bono de la popolo ĝenerale

ni jam havas Esperanton, kiu estas alte taksata kiel internacie tiel ankaŭ science, kaj ĝi estu instruata en la mezlernejo....

SAITŌ: Laŭ la nuntempa lecionaro de la mezlernejo, la "fremdaj lingvoj" estas instruataj kiel laŭvole elekteblaj objektoj. Sed la aktuala stato estas, ke estas la angla lingvo, kiun oni instruas, kaj nur malofte okazas, ke oni instruas la lingvon francan aŭ germanan ktp.... Ni ankoraŭ nun ne havas la ideon alpreni Esperanton.... kiel regulan objekton en la edukan programon. Kiel vi ĵus aludis, la esperantistoj faras movadon laŭ la vidpunkto, ke ĝi estas monda komunlingvo, kaj ankaŭ en Japanujo troviĝas konsiderinda nombro da membroj, kaj ni scias, ke en la lasta jaro okazis eĉ monda kunveno. Tamen ni konstatas, ke ĝi havas ankoraŭ nur tian civilan karakteron, kun kia ĝia movado estis lanĉita. Kaj se la studentoj el la diversaj gradoj ekinteresiĝas pri ĝi, tio prezentas problemon, kiun oni povas pritrakti kiel la aktivecon de unu el la lernejaj kluboj....

TAHARA: Ne! Kion mi timas, estas tio, ke se ni lasus daŭri tian staton, en kiu oni trouzas la anglan lingvon, eble okazus, ke ankaŭ kulture la usona kulturo superregus la landon, kie jam sen tio la politiko kaj diplomatio estas regataj de Usono, kaj la japana kulturo estos dronigita! Estas dezirinde, ke la fremdaj nacilingvoj estu instruataj por la studo de specialaj temoj; mi ja trovas tion eĉ necesa en la altlernejoj kaj universitatoj; sed tiam, instruon ne sole la anglan lingvon, sed ankaŭ la aliajn fremdajn lingvojn, rusan, germanan, italan, svedan ktp., por ke la studentoj laŭvole povu studi ilin paralele.... Laŭ via ĵusa respondo vi montriĝis resti nur kiel flanke-rigardanto al tiu problemo. Se la afero statas tiel, tio ne faras edukan politikon, nek nacilingvan nek fremdlingvan! Ne, tio ne estas bona. Kion mi volas konsili al vi, tio estas organizi ekzemple — Komisionon por la Fremdaj Lingvoj aŭ apartan sekcion pri la Fremdaj Lingvoj interne de la jam ekzistanta Komisiono por la Japana Lingvo, kaj igi ilin diskuti pri tio, ĉu por aŭ kontraŭ la adopto de Esperanto, kaj ankaŭ demandi la publikan opinion — antaŭ ol fari definitivan decidon pri tiu ĉi problemo. Mia nuna intenco ne estas venkobati vin aŭ esti venkobatita de vi dum ĉi tiu interpelacio; sed mi trovas vian ĵusan respondon nur tro aferisma, banala kaj indiferenta. Sinjoro ministro, mi denove petas vian respondon. Alte taksu Esperanton kiel internacian lingvon kaj instrui ĝin devige en la mezgradaj lernejoj, jen kion mi opinias ebla, ĉar temas pri ne tiel malfacila lingvo....

NAKAMURA: Laŭ la nuna stato de la afero, mi deziras, ke oni faru ĝin unu el la taskoj por la estonta esplorado!

LA ESPERANTO-INFORM-CENTRO NOVJORKA

Kvankam detala raportado pri landaj movadoj ne apartenas al internacia revuo, escepton postulas la agado de Esperanto-Inform-Centro en Novjorko.

La politika, ekonomia kaj lingva pozicio de Usono ĉiam donas apartan gravecon al la klopodoj de la tiea Esperanto-movado. Nun tiu movado, ĉefe dank' al la agado de EIC, komencis veki iom vastan interesiĝon.

Malgraŭ ĝia unika situacio, la labormetodoj de EIC certe povas stimuli novan pensmanieron ankaŭ ĉe aliaj landaj informaj fakoj.



EIC aranĝis intervjuon la 7-an de aprilo por Michael G. Duerr, redaktoro de "Business Abroad" (Eksterlanda Komerco). De maldekstre: s-ro Duerr; s-ino Margot Gerson, sekretariino de EIC; s-ro E. L. M. Wensing, direktoro de Philips; s-ro Giuseppe Grattapaglia, de FIAT, Italujo; s-ino Grattapaglia; s-ro H. R. Tonkin, vic-prezidanto de TEJO; s-ro Mark Starr, estro de EIC, vic-prezidanto de ELNA. Dum sia restado en Novjorko s-ro Wensing kaj ges-roj Grattapaglia ankaŭ faris publikan prelegon pri Esperanto kaj industrio. Louis Broido, de la Novjorka Departemento de Komerco kaj Industrio, telegrafis bondezirojn por "plej granda sukceso en viaj klopodoj antaŭenigi la uzon de Esperanto".

Kompare kun la esperplena, entuziasma kaj elokventa parolado "Lando de Libereco" de Zamenhof al la Sesa Universala Kongreso en Vaŝingtono, 1910, la kresko de la movado en Usono dum la intertempaj 56 jaroj certe ne estas kontentiga. Nur 733 pagis kotizon al UEA lastjare. Tro ofte la ankoraŭ vivantaj pioniroj nur ĝuas malfeliĉe sian nostalgion.

Sed nun montriĝas signoj de revekiĝo, kaj en la orienta parto de tiu ĉi kontinento tio okazas pro EIC, oficiala informa fako de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.

Inter la obstakloj en Usono estas la grandeco de la lando (192 000 000 loĝantoj sur 3 615 200 kvadrataj mejloj — 9 354 000 kv. km. — dividitaj en 50 apartaj ŝtatoj); la amasoj da diverslandaj enmigrintoj, por kiuj dum multaj jaroj la angla lingvo estis la ilo de civitaniĝo; la lingva ŝovinismo (ofte senkonscia), kiu identigas la progreson de la civilizo mem kun la alpreno de la usonangla lingvo, kiun grandaj subvencioj de la registaro kaj de tre fortaj fondaĵoj celas starigi kiel mondlingvo; kaj la konsekvenca bojkoto per silento kontraŭ Esperanto, ofte supozata jam mortinta.

Novjorko, kiel hejmo de U.N. kaj de gravaj gazet-informservoj, kaj tial mondcentro de informo, estas la plej taŭga loko por Esperanto-Inform-Centro. Nun ĉe la fama Kvina Avenuo (dividstrato), Numero 156, New York, 10010 (telefono 989-2716) funkcias EIC en sia propra hejmo jam de la aŭtuno de 1965.

Ĝis 1963 la usona movado, splitita de persona kalumniado, estis malforta. La estraro, dislokita en la kontinento, funkciis malrapide. Sed tiam en Kalifornio kaj Novjorko aperis junuloj, kiuj okazigis kunvenojn, korespondkursojn kaj tradukis gravan Gvidilon de Novjorko por la uzo de vizitantoj al la Mondfoiro. En novembro, 1964, aperis en populara revuo "This Week" mallonga letero (16 linioj), kiu rezultigis pli ol 11 000 petojn pri lernolibretoj. En la gazetara bulteno de United Press International (UPI), Arturo Higbee verkis favoran artikolon, kiu aperis en multaj ĵurnaloj kaj fine en novembro 1965 estis enmetita de reprezentanto R. C. Pucinski en la oficialan organon de la usona Kongreso (parlamento), "Congressional Record". Per la varma subteno de prezidanto F. E. Helmut, de la estraranoj de ELNA kaj de la anoj de la Novjorka Societo, novaj folietoj estis presitaj kaj senditaj al la petantoj. S-ino M. Murray, Margot Gerson kaj Bernard Stollman en Novjorko kaj Catherine Schulze en Kalifornio meritas apartan mencion inter la volontuloj. Sed la kresko necesigis oficejon en Novjorko ekster privataj hejmoj. Ni penis varbi anojn por ELNA kaj serĉi eblajn instruistojn. La ELNA-kongreso en Portland, 1965, voĉdonis pluan subtenon, kaj EIC poste ricevis subvencion de \$ 2 000. La modesta oficejo kostas \$ 70 monate, kaj volontuloj deĵoras ĉiutage por doni respondservon telefonan al petantoj. Kontrolkomitato kunsidas kaj raportas ĉiumonate al ELNA.

Jen sume la ĉefaj eroj en la atingoj de EIC: **Bibliotekoj.** Listo de rekomenditaj libroj, kompilita de Duncan Charters, estis sendita al pli ol 2 000 bibliotekoj. "Plena Vortaro" estis senpage donacita al la 30 publikaj bibliotekoj en Borough of Queens (civita distrikto en Novjorko). Poste, en 1965, 38 bibliotekoj usonaj petis senpagan ekzempleron laŭ propono en faka revuo "Research Quarterly". Al tiuj samaj UEA poste sendis sian Katalogon de Elektitaj Libroj en Esperanto.

Newsletter (anglalingva inform-bulteno). Aperis 10 eldonoj, senditaj al ELNA-anoj kaj interesitoj. Aperis ankaŭ gravaj informfolioj, entute en almenaŭ 15 000 ekz.

Radio kaj televido. Kiam s-ro E. L. M. Wensing vizitis Novjorkon en majo 1964, li estis intervjuita de la stacioj WEVD kaj WNBT, kaj luli kun komercistoj. WEVD prezentis 15 lecionojn de Esperanto en Novjorko kaj poste en Madison, Wisconsin. Pli mallonge kvarfoje Esperanto estis aŭdita je pli gravaj stacioj.

Gazetaro. Krom la ofte represita artikolo de Higbee aperis longaj artikoloj en "Newsday", "The Lion" (revuo oficiala de Lions International) kaj aliaj ĵurnaloj, kio tre helpis la kursojn kaj alportis multajn petojn.

Disvendo de libroj kaj diskoj. Mankas komplementa statistiko, ĉar libroj vendiĝas en Middleton, en Novjorko, en Kalifornio, senpere de UEA, k.a. La disko "Ni kantu en Esperanto" sukcesis, kaj la kovriloj de aliaj diskoj portas frazon en la Internacia Lingvo. Bernard Stollman kun d-ro J. Balbin preparas instrudiskon, ĉar la angla disko "Teenage Esperanto" montriĝis tre utila. Dave Richardson por ELNA finverkas novan lernolibron, kiu eble anstataŭos "Teach Yourself".

JK kaj la Propono al UN. EIC oficiale partoprenis en la Usona Misio al U.N., en lokaj konferencoj pri JK kaj en la tre grava kulmina "White House Conference" (nov. 28 - dec. 1, 1965). Kopioj de la sveda parlamenta propono estis senditaj al eminentuloj de internaciaj aferoj. Regule la estro de EIC ĉeestas la publik-inform-kunsidojn de U.N. kiel reprezentanto de UEA. (Denove okazas kurso de Esperanto por stabanoj de la sekretariato de U.N., gvidata de Thea Kohn.) EIC kolektis subskribojn de eminentuloj por la Propono al U.N.

Publikaj kunvenoj. Kun la Novjorka Societo, EIC utiligas la vizitojn de alilandaj esperantistoj por publikaj kunvenoj. Lastatempe ni bonvenigis s-ron E. L. M. Wensing kaj ges-rojn Grattapaglia, kiuj prelegis tre efike al 120 personoj. Okazis ankaŭ intervjuo kun la redaktoro de "Business Abroad". Ni jam planas utiligi la viziton de prof. Lapenna en oktobro, kiam li venos por oficiale prezenti la Proponon al U.N.



Kompreneble ni ne kontentiĝas pri la ĝisnunaj malgrandaj vivosignoj. La guto estas tre malgranda kaj la monto granita tre granda kaj malmola, sed almenaŭ la guto vive frapas.

Niaj celoj? Du mil anoj de ELNA. (Novjorko kaj la atlantika bordo hontas, ke en Kalifornio estas duoble pli multe da UEA-anoj.) Kolekto de financa helpo por ebligi almenaŭ unu salajratan oficiston en EIC por liberigi la volontulojn por intervjuoj, instruado, prelegoj kaj publika prezentado de Esperanto. Pli da regionaj organizaĵoj kaj konferencoj. Pli da privataj kaj publikaj kursoj kaj preparado de profesiaj instruistoj diplomitaj pri la instruado de la lingvo. Pli granda, pli bone ekipita oficejo por EIC. Pli da respondecaj junuloj kaj pli da negroj en niaj vicoj.

Sesdek jarojn post la lasta, ni esperas denove inviti Universalan Kongreson al Usono en 1970. Se ni volas, ni povas.

LA KVAR UNUJ JAROJ

(ESTAS LA PLEJ Malfacilaj !)

Kiam naskiĝis nia filino, Ĝojo, (oficiale *Joy*) en januaro 1961, mia edzino kaj mi jam sciopovis paroli Esperanton. Tiun lingvon ni studis jam de kelkaj jaroj. En 1961, kiel lingvo-fakestro en granda, duagrada lernejo apud Londono, mi instruis, krom la franca kaj hispana lingvoj, ankaŭ Esperanton — en oficiala, deviga kurso. Mia edzino instruis, sed ne lingvojn, en la sama lernejo. Malgraŭ sep-jara lernado de la franca lingvo en gimnazio ŝi tute ne kapablis libere konversacii en tiu lingvo.

Leginte artikolon en malnova numero de 'Gepatra Bulteno' (ne plu aperanta — bedaŭrinde), ni decidis, ke nia infano estos dulingva kun la angla kaj Esperanto. Mi, la patro, parolos al ŝi nur Esperante, kaj mia edzino kutime uzos nur la anglan lingvon. Ĉirkaŭite ĉefe de angle-parolantoj, Ĝojo sendube sentos plej forte la influon de tiu lingvo. Do ni interkonsentis, ke, kiel kontraŭpezo al tiu influo, mia edzino ankaŭ de tempo al tempo parolos Esperanton al ŝi. En septembro 1962 aperis en 'British Esperantist' artikolo de s-ro E. Revill el Manĉestro: 'Esperanto kaj Infanoj en la Familio*', kiu multe kuraĝigis nin.

Lingva influo de la patrino

Notinde estas, ke, kvankam mi parolis Esperanton al la bebo la tutan tempon kaj mia edzino nur de tempo al tempo, la infano (tiam jam dujara) komencis respondi en Esperanto unue ne al mi sed al mia edzino. Tamen, evidentiĝis, ke ŝi facile komprenas preskaŭ ĉion, kion mi diris al ŝi. Eĉ poste la lingva influo de la patrino restis la plej forta, sendube ĉar en siaj fruaj jaroj juna infano pasigas pli da tempo kun la patrino, ol kun la patro. Certe estus interese fari inversan provon: la patro parolus la nacian lingvon kaj la patrino Esperanton. Ĉu spite de la nacia medio Esperanto montriĝus pli forta ol la nacia lingvo?

Ofte okazis dum la kvarjara periodo, ke Ĝojo kaj mi troviĝis kune, sen la patrino, ekz. sabate en la ĝardeno. Tiam ŝi volonte kaj senhezite parolis kun mi nur Esperanton. Dum kelkaj monatoj ŝi sciis vortojn (ekz. sarko, rastilo, testudo k.t.p.) en Esperanto sed ne ties anglajn ekvivalentojn.

Okaze de vizitoj (de esperantistaj amikoj) al nia domo mi petis ilin paroli nur Esperanton. Kutime tiu aranĝo bone efikis, kaj dum la

daŭro de la vizito Ĝojo pli kaj pli kontribuis per Esperanto al la konversacio. Se iu en la grupo iel ajn senkonscie parolis nacilingve, tuj Ĝojo sentis, ke Esperanto ne plu estas bezonata, kaj reiris al la angla lingvo. Eĉ en la ĉeesto de ne-esperantistoj (al kiuj mi ĝentile senkulpigis min pro mia malĝentileco) mi daŭre parolis Esperanton al Ĝojo. Pro la ne-esperantistoj ŝi unue ĉiam respondis al mi angle, sed en sia kvara jaro ŝi komencis fieri pri sia scio de Esperanto kaj eĉ en la ĉeesto de neesperantistoj respondis al mi libere en Esperanto. De tempo al tempo pro nura kaprico ŝi rifuzis uzi eĉ unu vorton de Esperanto. Aŭ ŝi obstine respondis per 'Ne! Ne! Ne! Ne! Ne!' aŭ ŝi mem elektis Esperantan vorton (ekz. ovingo!) kiun ŝi laŭte elkriis, tiel ke ni apenaŭ sukcesis komprenigi nin! Dum la lasta jaro tiu fenomeno ne plu aperis, kaj Ĝojo ŝajne komprenas, ke dulingveco estas normala stato. Ni neniam igis ŝin paroli Esperanton por amuzo aŭ eĉ la intereso de ne-esperantistoj, kaj ni neniam koleriĝis pro ŝia foja rifuzo paroli Esperanton. Dum ŝia ludado kun junaj geamikoj en la ĝardeno mi ofte venis kun instrukcio aŭ informo por ŝi (ekz. 'La tagmango estas preta!') Tiujn informojn ŝi fiere tradukis por la aliaj infanoj.

Kutime estas mi, kiu faras rakonteton al Ĝojo je la enlitiĝo. Ĉefe dank' al la eldonejoj en Pekino ni akiris adekvatan stokon da ilustritaj infanrakontoj. Aliaj eldonaĵoj ankaŭ taŭgis, kaj la nuna biblioteko de Ĝojo konsistas el: Unua ABC-Libro; Tria ABC-Libro; Rimoj por Infanoj; ĉiuj infanlibretoj de la Pekinaj eldonejoj; la dek titoloj en la franca serio 'Kampomuso Ekskursas'; la tuta serio 'Legu kaj Lernu'; La Nigra Kokino; La Varma Rivereto; La Ebria Muso; Fajro! Fajro!; La Du Pupoj; Mojca Etulino; Erna; La Ŝtelita Lampo; La Novaj Vestoj de la Imperiestro; La Marvirineto; Amuzo per Scienco; Bildlibro pri Bestoj; kaj la gazetoj 'Planteto' kaj 'Nia Voĉeto'.

Unue legi en Esperanto

La infano estis nun iom pli ol trijara, kaj mia edzino proponis, ke ni instru al ŝi legi en Esperanto, ĉar la Esperantaj alfabeto kaj fonetiko estas pli simplaj, ol la anglaj. Tiu-ĉele ni preparis kartonajn rektangulojn 22cm altajn × 12 cm larĝajn. Sur unu flanko de la kartono ni skribis, per dikega kolorkrajono, ĉiun individuan, minusklan literon de la Esperanta alfabeto. Ĝojo baldaŭ komencis rekoni la plimulton kiel la komencliterojn de al ŝi konataj vortoj,

ekz. p — patro ĉ — ĉokolado
e — elefanto b — bebo

Per ruĝa kruceto en la dekstra malsupra angulo ni indikis, per kiu angulo la infano

* Represaĵojn liveras kontraŭ 1 respond-kupono: SBET, 2 Hazel Grove, Hartwood Park, Chorley, Lancs., Britujo.

devis teni la kartojn. Tiam, kiel dua paŝo, ni nun, denove per dikegaj koloraj literoj, skribis tutajn vortojn sur kartonstrioj ĝis 50 cm longaj kaj 12 cm larĝaj, ekz. lito, jako, amo, kie, blua, ilo, ĝojo, ovo, avo, avino, buŝo, kolo, inko, seĝo, sidas, verda, ruĝa, flava, nigra, blanka, sub, lavas, umbiliko, aŭtomobilo, jupo, du, unu, lano, simio, ŝafo, pendigas, vestoj, lipo, piedo k.s.

Preparo de simplaj legaĵoj

Tiujn vortojn Ĝojo rapide lernis eldiri. Baldaŭ ŝi ankaŭ komencis rekoni majuskulajn literojn, kaj tiujn ni nun skribis sur la dorsan flankon de la unuaj rektangulaj kartoj. Kiam ŝi sukcesis legi centon da vortoj sur la strioj — kaj por ŝi estis nur ludo lerni ilin — ni komencis fari simplajn legolibrojn. Ni aĉetis kelke da tiaj grandformataj, malmultekostaj kajeroj (22cm × 34cm), en kiujn infanoj kutime gluas ĉiajn eltondaĵojn. Sur ĉiun paĝon ni gluis simplan bildon tonditan el infangazeto, kaj per grandaj, dikegaj literoj ni aldonis simplan tekston, ekz.

Gojo sidas
Du knaboj ludas en la sablo
Gojo lavas vestojn
La robo estas verda
Gojo gladas robon
Unu knabo estas malbonkondukta k.t.p.

Unue Ĝojo emis lerni la tekstojn parkere, sed ŝi ĉesis tion fari, kiam ni komencis elekti unuopajn vortojn por prononcado. Poste ni adaptis simplajn bildrakontojn kiel 'Kiel Lu Ban Majstriĝis'. Unue ni aĉetis du ekzemplerojn de la bildrakonto kaj eltondis ĉiun bildon. Ni gluis unu bildon sur ĉiun paĝon de unu el la supre-menciitaj kajeroj kaj aldonis nian propran, tre simpligitan tekston, ekz.

1-a paĝo: Lu Ban estas ĉina knabo.
2-a paĝo: Li laboras kun sia patro.
3-a paĝo: La patro estas bona ĉarpentisto.

La rezultoj estis por ni tiel kontentigaj, ke ni decidis lasi provizore, sen iu ajn timo, la Esperantan legadon kaj enkonduki anglan legadon. Post sia sperto kun Esperanto Ĝojo facile sin adaptis al angla legado (ŝi estis nun trijara) kaj faris rapidan progreson. Ni estas certaj, ke ŝi facile reprenos pliposte la legadon de Esperanto.

Je la aĝo de 4 jaroj kaj 9 monatoj ŝi eniris elementan lernejon, kie ŝi baldaŭ eklernis skribi la anglan. Ni klarigis al la estrino pri nia eksperimento, kaj neniue instruistino aŭ kritikis aŭ mokis Ĝojon pro ŝia scio de Esperanto. Oni eĉ laŭdis ŝin pro tio kaj, aŭdinte min paroli kun la infano per tiu lingvo post la lecionoj, konsciis pri la fakto, ke Esperanto estas vivanta lingvo.

Skribado por juna infano estas ofte kopiado, kaj iom post iom Ĝojo kapablis kopii Esperanto-vortojn tiel facile kiel anglajn. Ŝi verkis

Esperanto-letereton de tempo al tempo al sia avino, kiu post la emeritiĝo eklernis la lingvon kaj dum vizitoj al nia domo kutime petis al Ĝojo helpon en la lernado de la lingvo! Ĝojo ankaŭ helpis prepari sonbendojn en Esperanto por sendi al la avino.

Ni profitis ĝis maksimumo el la maloftaj vizitoj al nia domo de alilandaj Esperantistoj, kiel ekzemple s-ro Kiotaro Deguĉi. Estis por ni grandega plezuro aŭskulti ĉe la pordo, iun tagon dum lia restado, kiam Ĝojo libere alparolis lin pri siaj Esperanto-libroj! En marto, 1966, ni havis la privilegion gastigi s-ran Nikolaj Rytjkov, la rusan aktoron, kiu, feliĉe por ni, scipovis malmulte de la angla kaj havis nenian inklinon uzi alian lingvon ol Esperanto dum sia vizito. Kun li Ĝojo flue kaj entuziasme babilis, sed de tempo al tempo, pro forgesemo, ŝi uzis la anglan lingvon. S-ro Rytjkov gaje respondis ruse, ĝis Ĝojo plene konsciis pri la fakto, ke *nur per Esperanto* ŝi povas interkompreniĝi kun li. Dum vizito de s-ro Rytjkov al ŝia lernejo, Ĝojo interpretis liajn dirojn por la aliaj infanoj, kaj kelkajn tagojn poste informis nin, ke al du amikoj ŝi jam ekinstruis Esperanton!

Kiel en sia propra lingvo, tiel ankaŭ en Esperanto Ĝojo havas siajn sensencaĵojn. Ekz. ŝi subite diras al esperantisto, 'Ĉu vi estas en la pilko?' aŭ 'Ĉu vi estas sub la planko?' Ni ankaŭ spertis infanajn mallongigojn kiel paĉ' por paĉjo aŭ ŝarĝaŭt' por ŝarĝaŭto, aŭ miksaĵojn inter la angla kaj Esperanto, kiel ekz. We are going to give an 'oston' (notu la akuzativon) to the 'hundo'. (Ni donos oston al la hundo).

Ĝojo ofte parolas pri lingvoj kaj pri lingvomalfacilaĵoj pro manko de komuna, dua lingvo por ĉiuj. La fakto, ke multaj ĉiutagaj Esperantaj vortoj estas pli longaj, ol la anglaj ekvivalentoj, devigis ŝin atente aŭskulti al ĉio en Esperanto. Rezulte de tio ŝi facile kapablis ripeti nekonatajn (al ŝi) vortojn en aliaj lingvoj. Kiam temis pri sekreta informo inter mia edzino kaj mi, ni devis uzi la francan lingvon. Kvankam sen kompreno, Ĝojo kun evidenta plezuro tutsimple ripetis niajn vortojn.



Estas nia celo konatiĝi kun rondo da alilandaj familioj, en kiuj estas ankaŭ denaskaj esperantistoj de la aĝo de nia filineto. Kun tiuj familioj ni espereble interŝanĝos leterojn, eventuale sonbendojn, kaj se eble vizitojn. Ni atendas kun granda intereso la unuan viziton de Ĝojo al Infankongreso. Ni ŝuldas multon al ĉiuj niaj esperantistaj amikoj, kiuj dum vizitoj al nia domo helpis krei ĉirkaŭ nia filino Esperantan atmosferon. Al tiuj gepatroj, kiuj hezitas instrui Esperanton al siaj tre junaj infanoj, mi diras kun s-ro Revill: ne atendu, komencu jam nun!

Frigyés Karinthy, la plej granda hungara satiristo kaj iama prezidanto de la hungara esperantistaro, skribis en sia novelo la historion:

Iu scienculo, iamaniere sukcesas vojaĝi al fremda planedo.

La tieaj loĝantoj akceptas lin kun granda interesiĝo kaj petas lin fari prelegon pri la historio de la tera homaro.

La scienculo sidiĝas al skribotablo kaj intencas verki la prelegon. Sed kiel skizi plejeble koncize la historion de la homaro?

Fine, post longa meditado, li ekskribis:

"Ve!"

Kaj post plua meditado: "ve!". Kaj denove: "ve!". Kaj la papero fine estas plenskribita per "ve!, ve!, ve!..."

☆

Se la mondhistorio estas senfinaj veoj, des pli koncernas tio la hungaran historion. En Plena Vortaro sub titolvorto "teksti" troveblas la ekzempla frazo: "la historio de la hungara nacio estas trateksita de multaj katastrofoj."

☆

Je la fino de la granda popolmigrado, okazinta de la kvina ĝis la deka jarcento, la hungaroj envenis el Azio, kie ili antaŭe loĝis. Ili okupis la nunan patrion kiel nomada, bredanta-fiŝkaptista, primitiva popolo. Ili ne estis pli bonaj ol la antaŭaj migrintaj, azidevenaj, barbaraj popoloj: hunoj, avaroj, normanoj, ĉar de 890 ĝis 955 ili vivis el rabmilitoj. Kaj ili ne estis pli malbonaj, ol la eŭropaj kristanaj popoloj, ĉar la rabmilitojn ili batalis kiel federaciuloj de kristanaj potenculoj kontraŭ la aliaj kristanaj regnestroj: en 894 ili federaciis kun la Bizanca imperiestro Leo la saĝa kontraŭ la bulgaroj, sekvontjare kun Arnulf germana imperiestro kontraŭ la slavo, en 954 kun Lindolf kaj Konrad germanaj princoj kontraŭ la imperiestro Otto I.

Kultura adaptiĝo

Sed ili tamen havis grandan avantaĝon, rilate al la ceteraj azidevenaj barbaraj popoloj: ili havis inklinon transpreni la eŭropan kulturon. La ceteraj elaziaj popoloj neniigis, sed la hungaroj en la dekunua jarcento kristaniĝis, elektinte ne la Bizancan, sed la Roman religion, per kio ili sin poreterne ligis al la Okcidento.

De post tiam la hungara kultureto senĉese altiĝis. Nur unufoje, en 1241, okazis grava katastrofo, la mongola invado sub la gvidado de Ĥano Batu, kies hordoj detruis ĉiun konstruitaĵon kaj ekstermis ĉian vivon, kiun ili trovis.

"TRATEKSITA DE

Sed ili baldaŭ retiriĝis kaj malaperis el Eŭropo, kiel ĉiuj aliaj ondoj de la popolmigrado.

La lando devis esti denove konstruita, kaj ĝi novkonstruiĝis dum kelkaj jardekoj.

La kulminon de la kultura nivelo la lando atingis dum la regado de reĝo Matiaso (1458-1490). Li estis entuziasma adepto de la Renesanco. Tiatempe ekfunkciis la unua hungara presejo de András Hesz en 1472, do post 15 jaroj de la invento de Gutenberg. En la reĝa kortego estis unu el la plej grandaj libraroj de la tiama mondo kun pli ol tri mil ornambinditaj volumoj. La dormoĉambro de la reĝo estis ankaŭ en la biblioteko, kiu tamen estis ne nur por lia uzado, sed publika instituto, ekipita per legoĉambroj por la studentaj sciencistoj, kiujn li kunvokis en sian kortegon el ĉiu parto de la mondo.

Li fondis la duan hungaran universitaton je 1467 en Pozsony (Nun Bratislava, Ĉeĥoslovakio. La unua fondiĝis je 1367 en Pécs.)

Norde de Budapeŝto li konstruigis la plej grandiozan palacon de Eŭropo, pri kiu episkopo Castelli, legato de papo Sixtus IV. skribis, ke "ĝi estas la tera Paradizo mem." Ĝi havis 350 ĉambrojn, parkojn kun skulptaĵoj, fontanoj.

Tiutempe Hungarujo atingis, kelkrilate eĉ superis la okcidentan kulturon.

Tiu ĉi briltempo ne longe daŭris. La turkoj jam minacis la sudajn limojn. Hungarujon tiam la Okcidento nomis: "la bastiono de Okcidento."



János Hunyadi, kiu neniigis la turkan armeon en 1456.

En la dekkvina jarcento la turkoj atingis la sudajn limojn, sed tiutempe Hungarujo ankoraŭ estis forta bastiono. Je 14 julio 1456 János Hunyadi (la patro de Matiaso) apud Nándorfehérvár (nun Belgrado) tute neniigis la turkan armeon. Tiam ordonis la papo, ke la preĝejoj sonorilegoj devas soni ĉiutage je la dekdua horo. La tagmeza sonorilado eĉ nun memorigas ĉiutage la mondon pri tiu venko.

Tiutempe jam komencis oldiĝi la mezepoka sociordo. Eŭropon trakuris la ondoj de la kamparanaj ribeloj. Komenciĝis per la Jacquerie en Francujo 1358, poste en Anglujo 1381, Bohemujo 1418, Germanujo 1525. En Hungarujo la unua okazis en 1437, kiu ankoraŭ estis malforta, sed la dua en 1514 sub gvidado de György Dózsa jam skuegis la tutan landon. Fine, kiam la nobelaro sukcesis venki, ĝi venĝis la ribelon kruele. La hungaraj servutuloj — kontraŭe al la okcidentlandanoj — ĝis tiam havis la rajton libere translokiĝi al alia bieno. Nun la nobelaro neniigis ĉi tiun rajton kaj la kamparanojn preskaŭ sklavigis.

180 jaroj da turka regado

La kruela venĝo forte afliktis la kampararon, kiu jam sentis nenion komunan kun siaj subpremantoj. Tiu ĉi antagonismo dividis kaj malfortigis la nacion kaj okaze de la sekvonta turka atako, en 1526, la hungara armeo apud Mohács estis tute neniigita.

La bastiono de Okcidento falis. La turkoj dum 180 jaroj regis la plej grandan parton de Hungarujo.

Nur Hungarujon kaj ne la hungaran popolon, kiun ili preskaŭ tute ekstermis kaj preskaŭ ĉiun kulturon sufokis.

La turkoj estis religie fanatika popolo kaj nekreema. Ili konstruis nur moskeojn kaj banejojn, sed loĝis en tendoj. Kaj estis regulo, ke kristano ne rajtas konstrui pli altan domon, ol la "pravreligia muzulmano". Imageble estas, ke preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj pereis, kie la turkoj regis. Sole parto de la luksa reĝa palaco en Esztergom saviĝis pro tio, ke la turkoj ĝin plenŝtopis per tero, por ke sur tiu bazo ili starigu kanonojn. La turka teritorio dezertiĝis. Tiu landparto havas nun preskaŭ nenian konstrustaĵon el la antaŭturka epoko. La hungaran pasintecon oni povas nun pli bone vidi en Bratislava, ol Budapeŝte.

Nur je la fino de la 17-a jarcento sukcesis la turkojn elpeligi la germanaj trupoj sub gvidado de Eugen de Savoya.

Sekvis la regado de la Habsburgoj, sed la hungara popolo gajnis nenion, ĉar ili konsideris la reakiritajn teritoriojn nur ekspluatenda kolonio. Por la bonstato kaj kulturo ili faris nenion, eĉ malhelpis ĉiun movadon por la

rekulturiĝo, ĝuste por pli facile bridenteni kaj ekspluati la popolon. Malkaŝe deklarita principo de imperiestro Leopoldo estis "fari Hungarujon almozulo, katoliko kaj germano." Ĉiuj "hungaraj" aristokrataj familioj estis fremdnaciaj, kiuj ricevis la bienegojn pro diversaj servoj al la dinastio kontraŭ la popolo.

Kion la turkoj ne detruis, nun detruis la Habsburgoj. La restaĵojn de la kastelego de reĝo Matiaso detruigis Leopoldo ĝis la tero en 1702, nur por venĝi la tiaman liberigan eksperimenton de la hungaroj, sen iu ajn strategia celo.

La liberecbataloj

Tiam komenciĝis la epoko de la liberecbataloj, kiuj neniam plu ĉesis. Jam en 1604 okazis revolucio en la orientaj landpartoj, kiu sukcesis iome liberigi Transilvanion. La sama ripetiĝis en 1621. Poste — nekalkulante la malgrandajn ribelojn — en 1703 eksplodis la liberecbatalo de Rákóczi, kiu daŭris ĝis 1710.

Post sia malvenko la nacio longe letargiiĝis. La pluraj eksperimentoj vice fiaskiĝis jam en ĝermo.

En 1848 en Parizo ekflagris la revolucio, kiu rapide trakuris Eŭropon. Ĝi atingis je la 13-a de marto Vienon kaj post du tagoj la hungaran ĉefurbon. La imperiestro vole-nevole donis konstitucion al ambaŭ landoj, sed je la fino de oktobro li sukcesis frakasi la Vienen revolucion kaj samtempe deklaris neniigi la hungaran konstitucion.

Li sendis armeon por venki Hungarujon, sed la armita popolo kontraŭstaris per neatendita forto. Je printempo de 1849 jam ĉiuj eŭropaj revolucioj estis sufokitaj, kiam la hungaroj rikoltis la plej brilajn venkojn. Ili elpelis la imperiestran armeon kaj je 14 apr. la hungara parlamento detronigis la Habsburgojn.

Pri ĉi tiu heroa batalo skribis Heine: "malvastiĝas sur mia brusto la germana jako, se mi aŭdas la nomon hungaro." La gvidanto de la revolucio estis Lajos Kossuth, unu el la plej puraj humanaj animoj de la mondhistorio kaj avangardisto de la homa libereco.

La imperiestro devis petegi rusan helpon de la caro. Giganta rusa armeo invadis Hungarujon kaj tiu fine sukcesis dronigi en sangon la liberecon. La invadan armeon forte helpis la aristokrataro, perdinta siajn antaŭajn privilegiojn.

Denove falis la orienta bastiono, nun tiu de la libereco-egaleco-frateco. La venĝo estis kruelega. Je 6 okt. Francisko Jozefo, la imperiestro, ekzekutigis ĉiujn generalojn de la revolucio, kaj poste ĉiuj oficiroj kaj politikistoj estis enkarcerigitaj aŭ pendigitaj.

☆

Jen, la pasinteco "trateksita de katastrofoj" kaj de senĉesa sopiro al libereco.

esperanto
junio 1966

LINGVO, JURO KAJ DIPLOMATIO

En la eldono de *University of Pennsylvania Press, Philadelphia*, kaj *Oxford University Press, London*, aperis antaŭ nelonge grava libro de Alexander Ostrower sub la titolo *Language, Law and Diplomacy*. La verko konsistas el du volumoj kun entute 963 paĝoj, Aldono, Bibliografio kaj Indekso. La prezo por ambaŭ volumoj estas £ 8-0-0.

La Unua Parto pritraktas la naciajn, "internaciajn" kaj diplomatajn lingvojn de la pasinteco kaj nuntempo, ilian karakteron kaj historion, kiel ankaŭ la metodojn de lingvaj praktikoj en oficialaj internaciaj rilatoj. La Partoj Dua kaj Tria estas entenataj en la Dua Volumo. La Dua Parto, interalie, prezentas la lingvan demandon en diversaj konstitucioj, la protekton de lingvaj minoritatoj sub la reĝimo de la Ligo de Nacioj kaj tiu de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kaj kondukas la leganton iom post iom al la pure juraj aspektoj de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, kiujn diskutas la Tria Parto.

Pri la verko aperis longa recenzo en la aprila numero de *International and Comparative Law Quarterly*, Londono, la plej grava brita revuo por internacia kaj kompara juro, eldonata de *The British Institute of International and Comparative Law*. En la recenzo, skribita de prof. I. Lapenna, troviĝas ankaŭ jena parto, kiu rilatas al la Internacia Lingvo:

"Kun kelkaj esceptoj, la faktoj estas korekte prezentitaj. Tiuj esceptoj koncernas ĉefe la Ĉapitron III sub la titolo "*International (Universal) Language*" (Internacia (Universala) Lingvo). D-ro L. L. Zamenhof ne publikigis sian unuan libron (en 1887) sub sia nomo, sed sub la pseŭdonimo 'Dro Esperanto' kaj la titolo de la libro ne estis *Langue internationale* (en la franca), sed 'Internacia Lingvo' (p. 83). Estas vero, ke laŭ Raporto publikigita de la Sekretariato de la Ligo de Nacioj 'ĉ. 4.000 publikaĵoj estis eldonitaj en Esperanto' (p. 84), sed tia estis la situacio en la fruaj dudekaj jaroj. Hodiaŭ unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo — tiu de la Brita Esperantista Asocio en Londono — havas pli ol 30.000 registritajn erojn. La informoj koncerne la kursojn de Esperanto en universitatoj kaj lernejoj (p. 84) estas komplete malnoviĝintaj. Nuntempe ekzistas lektoratoj de Esperanto en ĉ. 30 universitatoj de Aŭstrujo, Britujo, Bulgarujo, Okcidenta Germanujo, Hungarujo, Jugoslavio, Koreujo, Nederlando, Pollando kaj Ĉinujo. Katedro de Esperanto trovi-

ĝas en la Universitato de La Laguna. Tiu ĉi lingvo estas ankaŭ instruata en ĉ. 600 lernejoj de 32 landoj."

"La aŭtoro asertas rilate al Esperanto, ke 'antaŭ nelonge, en 1955, ĝiaj rolo kaj utileco estis profunde analizitaj dum la ĝenerala kunveno de Unesko en Montevideo' (p. 85). Fakte, la Ĝenerala Konferenco (ne ĝenerala kunveno) de Unesko, okazinta en Montevideo fine de 1954 (ne 1955) ne nur profunde analizis la rolon kaj utilecon de Esperanto, sed ankaŭ akceptis Rezolucion, per kiu ĝi, interalie, rekonis, ke 'la rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj rilatoj kaj la proksimigo de la popoloj de la mondo... respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko' (*Records of The General Conference, Eighth Session, Montevideo, 1954, p. 36*). La aŭtoro ankaŭ asertas, ke 'la uzo de helpa rimedo por sciencaj kaj teknikaj tradukoj estis denove diskutita de Unesko en 1957 en libreto kun titolo *The Possible Use of Languages Internationally Understood*' (La Ebla Uzo de Lingvoj Internacie Komprenataj) kaj li prezentas la rezultojn de tiu ĉi kvazaŭa diskuto (p. 85). Fakte tia diskuto neniam okazis en la kadro de Unesko, nek tia libreto estis iam publikigita de tiu organizaĵo."


"La aserto, bazita sur libro de Alexander Barmine, ke 'Stalin konsideris Esperanton kiel la estontan mondan lingvon ĝis la momento de sia senkuraĝiĝo pro la studo de tiu lingvo' (p. 85) estas same tiel malkorekta. Stalin neniam studis Esperanton kaj tial ne povis esti 'senkuraĝiĝinta'. Lia kontraŭstaro al Esperanto, kiun li opiniis esprimo de 'burĝa kosmopolitismo', lia malpermeso de la Esperanto-organizaĵoj en Soveta Unio kaj la amasaj persekutoj de ĉiuj, kiuj parolis tiun lingvon, estis kaŭzitaj ne de lia 'senkuraĝiĝo' pro la lingvaj eblecoj de Esperanto, sed, male, de la fakto, ke ĝuste Esperanto estis unu el la plej simplaj rimedoj por ordinara homoj en Soveta Unio por komunikadi kun la ekstera mondo, kio estis kontraŭa kaj al la Stalinista politiko celanta teni la sovetan popolon en hermetika izoliteco kaj al la ideo de la rusa lingvo kiel 'la monda lingvo de socialismo'".

"La aŭtoro ankaŭ diras, ke 'ĝis la hodiaŭa tago la landoj de la soveta bloko uzas Esperanton por siaj internaciaj radio-dissendoj' kaj li mencias la ĉiutagajn Esperanto-disaŭdiĝojn de la Pola Radio en Varsovio (p. 85). Tiu ĉi duonvero estas rekte misgvida. Fakte, 25 radio-stacioj de 13 landoj — inkluzive tiujn de Wien, Roma, Bern, Valencia, Hilversum, Rio de Janeiro, Pekino, Beograd, Zagreb — disaŭdigas regule en Esperanto, dum aliaj, ekzemple la Voĉo de Ameriko, havis programojn en tiu ĉi lingvo de tempo al tempo".

"Ĉiuj ĉi kaj pluraj aliaj eraroj pri faktoj aŭ gravaj ellasoj estas ĉefe kaŭzitaj de la

(daŭrigo dekstre)

LASTAJ INFORMOJ PRI LA LERNEJA KONFERENCO



2-a Lerneja Konferenco (Graz 23. - 28.7.1966).
Adreso: A - 8046 GRAZ. Banko: Steierm. Sparkasse, Graz, Schmidgasse, Konto 5431 (Esperanto-Konferenco).

Gravaj informoj:

La dua ĉefo de la Stiria Landregistaro, universitata profesoro d-ro Hans Koren afable transprenis en la nomo de la Unesko-Komisiono la aŭspicion por la Konferenco.

La Urbestro de Graz, Gustaf Šerbaŭm promesis senkoste doni litojn kaj matenmanĝojn por 90 gelernantoj, kiuj partoprenos la Infanrenkontiĝon "Infanoj ne konas limojn" (25.7-29.7.66 en Graz). Tio ebligis inviti po dek infanoj kun instruist(in)o el ĉiu najbara lando. Estas nun zorgo de la Landaj Asocioj helpi la instruiston kaj la infanojn veni al Graz.

La estro de la studenta hejmo, d-ro Eduard Frehsner, donos al infanoj kaj studentoj rimar-

kindan rabaton, tiel la ĉambro kostos por infanoj kaj junuloj nur 30 aŭ. ŝ. anstataŭ 50 aŭ. ŝ. Per kontrakto ni certigis, ke la infanoj ricevos taŭgajn manĝaĵojn. Kiam ni havos superrigardon pri la partoprenontaro, ni penados, ke studenta restoracio estu malfermita dum la daŭro de la Konferenco. LKK nun rezervigis la tutan studentan hejmon (370 ĉambroj!). Neniu timu ne plu ricevi komfortan ĉambron en la studenta hejmo. Malgraŭ tio ne plu prokrastu la forsendon de via aliĝilo, ni ja volas plej baldaŭ kunmeti la bultenon. Ne forgesu sendi la kotizon, ĉar nur post alveno de la kotizo ni rezervigos la ĉambron por vi. Ne plu necesas antaŭpagi la ĉambron, ĉar jam ni antaŭvidas atingi la garantiitan nombron.

Se vi ne havas aliĝilon je via dispono sufiĉas simpla folio kun plena adreso.

LKK-prezidanto Josef Wesian

(daŭrigo de maldekstre)

fakto, ke la aŭtoro utiligis aŭ malnoviĝintajn aŭ nefidindajn fontojn por tiu ĉi parto de la libro. Oni povas nur esperi, ke preparante foje alian eldonon li estos pli atenta koncerne la elektadon de la fontoj kaj pli objektiva en la studado de ĉiuj eblecoj, kiujn prezentas nacie kaj politike neŭtrala lingvo por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Tio certe devigos la aŭtoron ŝanĝi aŭ modifi kelkajn starpunktojn aŭ konkludojn, sed tio povos nur grandigi la sendiskutan valoron de tiu ĉi rimarkinda verko".

KOMERCAJ LINGVOJ DE LA MONDO

Sub tiu titolo ĵus aperis grava studo de Max K. Adler, eldonita en la angla lingvo de "The Institute of Marketing" (Instituto de Enmerkatego). Ĝi celas prezenti la mondan lingvan situacion el vidpunkto de anglalingvaj komercistoj kaj rekomendi al ili lernadon de elektitaj fremdaj lingvoj.

La aŭtoro montras sin lingvistike malnaiva: "Tra la tuta mondo estas parolataj du mil ĝis tri mil lingvoj. Precizan nombron oni neniam povos fiksi, ĉar ĝi dependas de la difino de 'lingvo'. Unuj lingvo-studentoj, ekzemple, inkluzivas la flandran sub la nomo nederlanda; aliaj tamen insistas, ke la flandra estas sendependa lingvo, kvankam intime ligita kun la nederlanda. Ĉe kiu punkto dialekto fariĝas lingvo?" Por iel limigi la studon li do konsideras nur tiujn lingvojn, kiujn parolas minimume 50 milionoj, kaj kiujn uzas la internacia komerco, nome: angla, araba, ĉina,


franca, germana, hispana, itala, portugala, rusa.

Por taksi ilian relativan gravecon li provas, kompreneble kun multaj kondiĉoj kaj rezervoj, tabeligi la komercan uzadon de tiuj lingvoj, unue sur bazo de la loĝantaro de diversaj landoj, due sur bazo de iliaj importoj. La du bazoj donas malsamajn rezultojn, ĉar, ekzemple, "18% de la mondo estas ĉinlingva laŭ loĝantaro, sed nur 2% laŭ la importoj". El tio li konkludas, ke la potenciala graveco de la ĉina kiel komerca lingvo estas multe pli granda, ol ĝia aktuala graveco.

La konkludoj de Adler estas aparte interesaj. La angla... "estas la vera komerca mondlingvo de la nuna tempo. Ĝi estas la unua lingvo de ĉirkaŭ duono de la komercistaro de la mondo kaj dua lingvo por preskaŭ duono de la ceteraj." Sed li antaŭvidas ŝanĝitan situacion: "Ĉar la naskofteco ĉe la ne-blankaj rasoj estas multe pli granda, ol en Eŭropo kaj Ameriko, kaj ĉar la vivnivelo de tiuj rasoj daŭre altiĝas, kvankam malpli rapide, ne estas maleble, ke la angla kiel komerca lingvo jam finis sian ekspansion, kaj eĉ, ke ĝia graveco komencos malkreski."

Kiujn lingvojn do studu anglalingva komercisto, kaj kiujn prefere instruu la lernejoj de angla-lingvaj landoj? Por tiu lernado Adler rekomendas la francan, germanan, hispanan kaj rusan, laŭ tiu ordo. Al lernejestroj li rekomendas: por la venontaj 15 jaroj, la francan, la rusan, kaj poste la germanan kaj hispanan preskaŭ egale; por instruado post 15 jaroj: la ĉinan, francan, rusan, germanan kaj hispanan, laŭ tiu sama ordo.

esperanto
junio 1966



E. A. Bokarev

Rusa-Esperanta vortaro, red. E. A. Bokarev. Eld. "Soveta Enciklopedio", Moskvo 1966. 536 p. 50 000 ekz. 4,— gld. (16 st.)*

Finfine aperis la delonge sopirata Rusa-Esperanta vortaro, kompilita de taĉmento da eminentaj rusaj esperantologoj sub la gvidado de p-ro Bokarev, membro de la Akademio de Esperanto. Kvankam la aŭtoroj ne pretendas je pleneco (la vortaro spegulas la hodiaŭan ĉiutagan rusan lingvon kaj principe ne registras la Esperantajn neologismojn) kaj destinas sian verkon al uzado por traduko de ne tro malfacilaj tekstoj, tamen ĉi tiu vortaro kun siaj 24.000 vortoj estos gravega helpilo por la multnombraj (vidu la eldonkvanton) ruslingvaj esperantistoj, kiuj ĝis nun disponis pri tre malgrasa materialo por lernado de la lingvo. Pro tio ĝia apero devas esti konsiderata kiel grava evento.

Kiel multaj aliaj rusaj-alilingvaj vortaroj, ĝi donas en sama artikolo la kernvorton kaj la derivaĵojn. La diversaj sencoj — do la diversaj tradukoj — de multaj rusaj vortoj estas evidentigitaj per sinonimoj aŭ aldonaj klarigoj. Ne ĉiam tamen: la leganto, kiu ne bone povoscias Esperanton, ne komprenos,

ekzemple, en kiaj okazoj *ĉrezvyčajnyj* povos tradukiĝi per *ekstrema* anstataŭ *eksterordinara*, aŭ kiam *sploŝnoj* devos tradukiĝi per *densa*, *senĉesa* aŭ *senescepta*. Por *neĉajanno* mankas la senco *nevole*, por *kartina* la senco *filmo*. La artikoloj koncernantaj prepoziciojn, konjunkciojn k.s. estas sufiĉe detalaj. Enestas ankaŭ multaj rusaj idiotismoj kaj frazeologiaj parolturnoj. Plie, la rusaj vortoj estas akcentitaj. Do la vortaro povas taŭgi ankaŭ por esperantistoj, kiuj studas la rusan lingvon. Ni esperas nun la baldaŭan aperon de la dua volumo, t.e. de la Esperanta-Rusa vortaro de la sama aŭtoro.

Michel Duc-Goninaz (Francujo)

Versoj por infanoj, de Nenjo Rimanto. Eld. la aŭtoro, 69 p. 20 x 16 cm., il., ofsetita. 2,50 gld.*

124 poemetoj por tre junaj infanoj. Grava kontribuo al infanliteraturo. Tamen la presliteroj estas multe tro malgrandaj, por ke infanoj de malpli ol 11 jaroj mem ĝuu la legadon. La bildoj estas amatoraj, kaj kelkaj el la infankapoj prezentitaj estas preskaŭ groteskaj.

Raif Markarian (Britujo)

* Mendu ĉe UEA

UNU ALFABETO POR AFRIKAJ LINGVOJ

Skribitaj interalie ĝis nun laŭ diversaj konceptoj kaj metodoj kelkfoje malsimilaj, ses grandaj lingvoj de okcidenta Afriko ĵus ricevis post laborplena semajno unu komunan alfabeton, unuigitan, racian kaj praktikan, laŭ latinaj skribsignoj.

Internacia lingvista grupo kunvenis en Bamako (ĉefurbo de Malio) sub aŭspicio de Unesko de la 23a de februaro ĝis la 5a de marto kaj studis la malfacilajn problemojn de transskribo por la lingvoj:

MANDINGA (Bambara kaj Malinke en Malio, Gvineo kaj okcidento de Senegalio)
 SONGHAJA (Malio kaj Nigerlando)
 TAMAŜAGA (Lingvo de Tuaregoj)
 HAŬSA (Nigerio kaj Nigerlando)
 KANURIA (Nigerio kaj Nigerlando)
 PEŬLA (Disvastigita lingvo de Senegalio ĝis nordo de Kameruno)

Du celoj gvidis la laboron de la lingvistoj: unuflanke proponi por la koncernaj lingvoj unu komunan alfabeton por ĉiuj sonoj komunaj, vokaloj kaj konsonantoj. Aliflanke kompili plej simplan kiel eble alfabeton por evitigi al la afrikaj ŝtatoj teknikajn kaj ekonomiajn mal-

facilaĵojn, kiuj povus malhelpi eldonon kaj elementan instruon.

Tiuj celoj estis atingitaj sen forlasi la esencajn postulojn de la tasko. La lingvistoj definitive elektis alfabeton tre simplan, kiu permesas korekte skribi la fonemojn de la koncernaj lingvoj kaj samtempe ne multe malproksimiĝas de la plimultaj eŭropaj lingvoj.

Fakte la alfabetoj de tiuj ses lingvoj estas preskaŭ identaj. Tiuj de la peŭla, haŭsa, tamaŝaga kaj songhaja havas entute ok aldonajn literojn (b, d, y, z, t, k, kun "kroĉo", n kun speciala skribostreko, kaj e renversita). Tiuj apartaj literoj estas dek ses kun la majuskloj kaj postulas tre etajn kaj malmultekostajn ŝanĝojn en la klavaro de pres- kaj skrib-maŝinoj. Laŭmemore tiuj literoj ekzistas jam de kvardek jaroj, estas praktike uzataj en Nigerio de longa tempo kaj en Nigerlandaj lernolibroj.

Jam de nun ses lingvaj komunumoj dispartitaj sur la teritorioj de sep nacioj disponas alfabetojn, kiuj devus permesi tujan transskribon de la vastega parola literaturo, kies studo estas pli kaj pli urĝa. Samtempe la ŝtatoj povos nun tutkonscie plani la uzon de naciaj lingvoj por alfabetigo de plenkreskuloj kaj elementa instruado.

(Unesko-Novaĵoj)

Tradukis Ibrahim Sori Tamboura

Modernaj lignogravuraĵoj de Ĉinio. Eld. Ĉina E-Ligo, Pekino, 1965. 89 p. 26 x 23 cm., kolorpresita. 4,55 gld.*

Kiam oni parolas pri la azia arto, oni ĝenerale kaj kutime mencias pri la kolizioj aŭ harmonioj de la kulturoj orienta kaj okcidenta. Guste tiel ni vidas sur la noveldonita albumo la influon de la ĉinpropra tradicia arto kaj de la okcidenta, kiu enfluis en tiun landon dank' al la klopodoj de la mondfama verkisto Lusin, kiu surbaze de la sia ĉerpis novan forton el la japana, akceptinta la okcidenton pli frue, kaj el la okcidenta, laŭ li reprezentata de la germana kontraŭfaŝistino Käthe Kollwitz. Nun ni vidas ĝuste tion: la plej karakterizaj ĉinaĵoj el la ĉizilo de Feng ĝongtie kaj de Gu Juan lasas nin imagi pri la antikva kamajo*, kaj, aliflanke, la verkoj de Huang jongju aŭ de Tan kjuansŭ k. a. kondukas nin al la moderna (t.e. en Azio, okcidentinklina). Ne nur la menciitaj sed preskaŭ ĉiu peco estas plena je etoso kaj la tuton faris nepre havinda, fierinda. La recenzinto, japano, preferas ilin al niaj propraj, en kiuj niaj artistoj tro tordas la realon kaj ĉasas popularan furoron, sed al ili mankas la popolo, kvankam ili ofte ĝuas mondan reputacion.

Miyamoto masao (Oosaka)

* kamajo: unukolora pentraĵo.



Vu fan: "Servantino"

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Pécs. Eld. Fremdultrafika oficejo de urbo Pécs, Széchenyi tér 1, Hungarujo. Senpaga kolora turisma faldfolio.

Vichy. Eld. Syndicat d'Initiative, 19 rue du Parc, Vichy, Francujo. Nova kolora prospekto.

NEKROLOGOJ

BJÖRN P. BLÖNDAL (1888-1966)

Björn P. Blöndal, delegito de UEA de post 1912, mortis en Hvammstanga, Islando, la 15-an de marto.

MIĤAIL SEGAL

Forpasis en Rostov-Don la delegito de UEA Miĥail Segal, veterano de la movado en Sovet-unio.

ELISABETH VAN VEENENDAAL-BOUWES

Forpasis en Limmen, Nederlando, 68-jara, s-ino E. v. Veenendaal-Bouwes. Ekde ĝia fondo en 1938 ŝi dum multaj jaroj gvidis la antaŭulon de TEJO, TJO (Tutmonda Junulara Organizaĵo), kies organon "La Juna Vivo" ŝi fondis kaj redaktis jam pli frue. (Plena nekrologo aperos en "La Juna Vivo", juli-aŭgusto.)

KONRAD DEUBLER (1885-1966)

La 23-an de aprilo mortis Konrad Deubler, Munkeno. Li estis kunfondinto de SAT, redaktoro de "Arbeiter Esperantist" 1927-29, dum multaj jaroj fakdelegito de UEA kaj ĝia komitatano de 1956 ĝis 1964.

LA POLITIKA UZO DE ESPERANTO

Via artikolo en la marta numero de "Esperanto" esprimas tre bone ankaŭ mian opinion, ke unu el la funkcioj de Esperanto estas la interŝanĝo de ideoj. Tiuj, kiuj opinias, ke Esperanto, por esti "neŭtrala", ne estu uzata por la esprimado de (aŭ la varbado por) ideoj, spirite kripligas la Esperanto-movadon.

Laŭ mia opinio unu el la plej eksterordinaraj valoroj de Esperanto estas ĝia kapablo ne nur diri "Bonan tagon!" al alilandano aŭ mendi matenmanĝon ie kvin mil kilometrojn for de hejme, sed servi kiel spirita ponto de homo al homo.

Karl Nell

Rochester, Usono, 7 apr 66

PRI UNUECA PRONONCADO

En "Esperanto" de aprilo, sur p. 74, mi legis leteron treege interesan de s-ro Pauli Riichi-vaara el Finnlando. Bedaŭrinde ekzistas multaj, kiuj ne prononcas bone kelkajn vortojn. Mi estas certa, ke ili kutimiĝos al la bona prononcado, se tiuj, kun kiuj ili parolas, precipe nesamlandanoj, tuj korektos ilin.

Ioanis P. Kaloumenos

Ateno, 19 apr 66

nekrologoj
leteroj

esperanto
junio 1966



Prof. Lapenna ĉe Radio Praha, 26 aprilo. Maldekstre: red. František Zajíček; dekstre: s-ino Jana Čichová. (Vidu sub Ĉeĥoslovakio, ankaŭ Hungarujo, Pollando.)

LAŬLANDE

Ĉeĥoslovakio

• Vojaĝante tra pluraj landoj pro studvojaĝo, prof. Lapenna renkontiĝis kun la gvidantoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj aliaj aktivuloj, intervjuiĝis por Radio Praha kaj prelegis pri UEA antaŭ plenega salono de la Esperantista Klubo en Praha.

En Budapeŝt prof. Lapenna prelegis antaŭ 200 personoj.



Li ĉeestis ankaŭ la 1-an tutŝtatan kunvenon de la junulara sekcio de ĈSEK. Li parolis al kvindek da delegitoj pri TEJO kaj ĝia signifo. Raportis radio kaj televido.

Francujo

• La 5-a Paska Kultura Semajno en Grésillon, kun programo de diversstemaj prelegoj, ekskursoj, k.a., allogis partoprenantojn el Danujo, Francujo, Hispanujo, Irlando, Italujo, Centra Afriko, Urugvajo kaj Japanujo.

Hungarujo

• Vizitante Hungarujon pro studvojaĝo, la prezidanto de UEA, prof. Lapenna, havis plurajn renkontiĝojn en ligo kun la preparado de la 51-a Universala Kongreso. Lin akceptis en sinsekvaj tagoj la Vicprezidanto de la Respubliko, la ĉefurbestro de Budapeŝt, la ĝenerala sekretario de la Konsilantaro de la Sindikatoj; li partoprenis gazetaran konferencon, kiun ĉeestis reprezentantoj de UPI, TASS, orientgermana kaj ĉeĥa agentejoj, kaj hungaraj gazetoj kaj radio; li kunvenis ankaŭ kun la prezidantaro de HEA, kun LKK, kaj kun la esperantistaro de Budapeŝt kaj Pécs.

• La speciala poŝtmarko okaze de la 51-a U.K. nun verŝajne ne realiĝos, kontraŭe al nia informo en majo, p. 96.

Israelo

• Jam plivigliĝas la israela movado fronte al la organizo de la 52-a U.K. en Tel Aviv en 1967.

Jarkonferencon de Esperanto-Ligo Israela komence de aprilo ĉeestis ĉ. 100 aktivuloj. Jam aperis nova lernolibro por hebrelingvanoj; vortaro hebrea-Esperanta estas en preparo.

- La 19-an de julio 70-jariĝos s-ro Ota Ginz, defrua aktivulo de la movadoj ĉeĥa kaj israela, kunredaktinto de "Ĉeĥoslovaka Antologio", ktp.

Japanujo

- La japanlingva verko de Kĵotaro Deguĉi "Mia vojaĝo en Esperantujo" (vidu feb., p. 35) estis dum pluraj monatoj la plej bone vendata libro en Japanujo. La aŭtoro jam ricevis pli ol 3000 leterojn de legintoj, i.a. multaj eminentuloj.

- La organizaĵo "SERVAS", internacia kooperativa sistemo por gastigo de vojaĝantoj en la hejmoj de membroj, rapide vastiĝas en Japanujo. La internaciaj konferencoj de SERVAS en Parizo (1964) kaj Vieno (1965) rezoluciis favore al Esperanto. En Japanujo la UEA-delegitoj de Oosaka kaj Tojonaka aktivas en la movado.

Jugoslavio

- Kvankam ekzistas ampleksa vortaro Esperanta-serbakroata, ĝis nun ne ekzistis adekvata vortaro serbakroata-Esperanta. Por plenigi tiun mankon baldaŭ aperos nova vortaro de Marinko Givoje kun ĉ. 35 000 eroj.

Kanado

- La televida kanalo Toronto-6 elsendis 15-minutan intervjuon kun Ken Price, sekretario de Kanada Esperanto-Asocio. Nova elsendo okazos somere.

- K.E.A. preparas eldonon de Kanada Antologio.

Koreujo

- Grupo de 11 japanaj esperantistoj vizitis la landon, i.a. 2 semajnojn en Seulo, por kontakti kun la korea movado.

Nederlando

- La inaŭguro de nova Esperanto-monumento en la strato Zamenhofdreef en nova kvartalo de Utrecht okazos la 3-an de septembro, 1966, je la 11.00 h.

Pollando

- Dum vizito komence de majo la prezidanto de UEA renkontiĝis kun la ministro de kulturo, la vicministro de edukado kaj la prezidanto de la Akademio de Sciencoj, kaj prelegis en Gdańsk, en Kraków kaj en Varsovio (por vasta publiko pri la lingva problemo, por esperantistoj pri la rolo de UEA).

- La granda romano "La faraono", kiun tradukis en Esperanton Kabe, aperas nun sur pollandaj ekranoj, filmita de konata reĝisoro J. Kawalerowicz.

Sovetunio

- Aperis en 15 000 ekz. litova traduko de la ĉina infanlibreto "Karpetoj transsaltis la drakpordon". El la Esperanta teksto tradukis N. Grigas. Ĝi estas kredeble la unua ĉina verko tradukita kaj eldonita en alia nacia lingvo per la ponto de Esperanto.

Svedujo

- Sveda Esperanto-Federacio transiris en pli grandan oficejon: Munkbrogatan 9, Stockholm C.

- Tra la neĝoj de februaro kaj marto prelegvojaĝis studento Hidejuki Sakaeda el Tokio de Sundsvall norde ĝis Trelleborg sude.

LAŬFAKE

Literaturo

- Ankaŭ ĉi-jare oni aljuĝos la premion "Comella-Bassols" (2000 pes., 400 st.) al la plej bona gaja rakonto en Esperanto. Limdato: 31 aŭgusto 1966. Petu detalan regularon de s-ro Francisc Vilà, Laŭria 12-1a, Barcelona-10, Hispanujo.

Religio

- La katolika revuo "Nova Civito", kiu ĉesis aperi post la unua eldono de 1965, povos reaperi sub nova administrado, kondiĉe ke 1000 personoj promesas aboni (laŭ la antaŭa kotizo, 1200 liroj jare). Abonpromesojn oni sendu al pastro G. Jacobitti, Piazza S. M. Maggiore 8, Roma, Italujo.

Sporto


- Germana E-Asocio distribuas presitan karton por varbi subskribojn apoge al la propono al la Internacia Olimpika Komitato pri oficialigo de Esperanto.

Tekniko

- Ĝeneralan fakorganizaĵon de teknikistoj klopodas starigi s-ro Ilija Andreev, Loznica, distr. Razgrad, Bulgarujo.

Hidejuki Sakaeda inter Rosza Doboš (maldekstre) kaj Erna Johansson post prelego en Skövde (Vidu sub Svedujo).





Ĉe la lago Genezaret

Post nia publikigo en la marta numero 1966 de la revuo Esperanto sur paĝo 57, ni povas nur nun doni pliajn informojn pri la vojaĝo al Israelo, ĉar intertempe ni devis multajn detalojn esplori kaj trakti. La cirkonstancoj kaj preskriboj estas iom aliaj, ol koncerne la vojaĝon al Tokio, sed ankaŭ nun ni povas certigi al la kongresanoj plej sekuran, rapidan, komfortan kaj malmultekostan vojaĝon. Antaŭ nelonge la Konstanta Kongresa Sekretario pasigis tri semajnojn en Israelo, faris la unuajn kontaktojn kun LKK kaj, precipe, persone esploris la kvaliton de ĉiuj proponitaj hoteloj. Nun ni povas informi pri la jeno:

Datoj de la Kongreso — Pro la specialaj cirkonstancoj en Israelo la Kongreso okazos ne, kiel kutime, de sabato ĝis sabato, sed de merkredo la 2-a de aŭgusto ĝis merkredo la 9-a de aŭgusto 1967.

Forveturo — Pro tio ankaŭ la datoj de la vojaĝo devis esti ŝanĝitaj. Nun la forveturo okazos dimanĉon la 30-an de julio 1967. La saman vesperon oni alvenos en Tel Aviv. La morgaŭan tagon oni povos ricevi la kongresajn dokumentojn, kaj oni havos 2 tagojn por konatiĝi kun la urbo kaj jam viziti vidindaĵojn antaŭ la Kongreso.

Reveturo — Dimanĉon la 20-an de aŭgusto 1967 oni reflugos el Tel Aviv al Eŭropo. Sekve, oni havos 10 tranoktojn en la hotelo en Tel Aviv, kaj poste 10 tagoj restos por vidi la landon.

Postkongresa ekskurso — Por tiuj 10 tagoj tre bela Postkongresa Ekskurso estas planata, dum kiu oni vizitos ĉiujn famajn lokojn. Oni ne

tranoktos ĉiun tagon en alia urbo, sed oni restos po tri tagoj en 3 diversaj urboj, de kie oni veturos al diversaj vidindaĵoj. Detaloj pri tiu ekskurso estos publikigitaj kiel eble plej baldaŭ.

Hoteloj — S-ro Pompilio konstatis, ke la proponitaj hoteloj en la plej simpla kategorio pro diversaj kialoj estas maltaŭgaj por nia celo. Tial forfalas tiu kategorio, kies prezo antaŭe estis indikita kiel 830,— gld.

Dulitaj kaj unulitaj ĉambroj — La ĉi sube indikitaj prezoj por la karavano validas por unu persono, sed antaŭviditaj estas dulitaj ĉambroj. Prefere do oni trovu personon por havi ĉambron kune. Unuopaj personoj, kiuj nepre deziras unulitan ĉambron, devas alpagi ekstran sumon por la tuto. Ankaŭ tio estas ĉi sube indikita.

Proksimumaj prezoj — La indikitajn prezojn oni devas konsideri ne plene definitivaj. Ili estas validaj en la nuna momento, sed, unuflanke, se la nombro de partoprenantoj estos granda, verŝajne la prezoj povos iom malaltiĝi; aliflanke, dum unu jaro povos okazi iuj ŝanĝoj en la tarifoj, kiuj nun ankoraŭ ne estas konataj. Kompreneble, ni faros ĉion por teni la prezojn kiel eble plej malaltaj.

Vojo — La prezoj validas por la vojlinio Amsterdam — Tel Aviv — Amsterdam. Ni estas traktantaj pri la ebleco veturi en la kadro de la karavano ankaŭ el aliaj eŭropaj ĉefurboj. La rezulton ni publikigos kiel eble plej baldaŭ. Tiukaze, kompreneble, la prezoj estos adaptitaj laŭ la diversaj ekirpunktoj.

(daŭrigo dekstre)

51-a UNIVERSALA KONGRESO
Budapest, 30.VII - 6.VIII.1966

Sub la Alta Protektado de S-ro Ödön Kishazi,
Vicprezidanto de la Hungara Popola Respubliko.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

Fervoja rabato: Per cirkulero no. 106256/1966.
1/8. D de la 16-a de marto 1966 la Ministerio
pri Transportoj Hungara informis ĉiujn kom-
petentajn fervojajn instancojn en Eŭropo, ke
la partoprenontoj en la 51-a Universala Kon-
greso rajtas ricevi rabaton de 50% je la normala
prezo por la vojaĝbileto en la hungara teritorio.
L.K.K. estas nun atendantaj informojn pri sama
favoro fare de aliaj ŝtataj fervojoj.

Aliaj rabatoj: La partoprenantoj en la 51-a
Universala Kongreso havos la eblecon uzi
senpage — dum la kongresa periodo — ĉiujn
publikajn transportilojn en Budapest (tramoj,
aŭtobusoj, subtera fervojo).

Postkongreso: Por doni la eblecon al la parto-
prenantoj de la 51-a U.K. trankvile ĝui viziton
de Budapest post la Oficiala Fermo de la Kon-
greso, L.K.K. aranĝis, ke la forveturo al Sze-
ged, por la Postkongreso, okazu la 7-an de aŭg.
en la mateno. La interesigantoj bonvolu tion
konsideri mendante loĝejon en Budapest.

Hoteloj: Ni informas, ke ne plu estas ebleco
rezervi litojn en hotelo de Kategorio D. Ni
samtempe atentigas, ke mendoj por litoj en
hoteloj de kat. A, B kaj C devas atingi la
konstantan adreson de la Kongreso antaŭ la
25-a de majo 1966 — vidu informojn pri tio en
la Dua Bulteno.

Kotizalpago: Laŭ la Kongresa Regularo aliĝoj
al U.K. estas akceptataj ĝis la 30-a de junio.
Personoj, kiuj, pro iu ajn kaŭzo, aliĝas post tiu
dato, devas senescepte alpagi al la fiksita
kotizo la sumon de 25,— ned.gld. aŭ egalvaloro,
por kompensi la ekstrajn kostojn, kiujn pro-
krastita aliĝo kaŭzas.

Alpago ekskursoj: Ni atentigas, kiel menciite
en la Dua Bulteno, ke mendante ekskursojn
post la 25-a de junio oni devas pagi 15% pli
multe, kondiĉe ke estos ankoraŭ liberaj lokoj.

Statistiko (je 12.5.66): Alĝ. 2, Arg. 2, Aŭstral. 5,
Aŭstrujo 44, Bel. 51, Braz. 2, Brit. 124, Bulg.
202, Ĉeĥ. 334, Dan. 55, Finn. 71, Fran. 287,
Germ. 355, Grek. 6, Hisp. 15, Hong. 1, Hung.
487, Irl. 2, Isr. 7, Ital. 107, Jap. 36, Jug. 81, Kan.
3, Meks. 1, Monako 3, Ned. 131, Norv. 17, NZ 4,
Pol. 70, Rum. 26, Sov. 28, Sve. 139, Svis. 31,
Turk. 1, UAR 1, Urug. 1, Usono 52. Entute
2784 el 37 landoj. (Lastmomente: 2867)

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario



U.E.A.-membreco — La partoprenantoj en la
karavano devos esti individuaj membroj de
U.E.A. en 1966 kaj 1967 (minimуме MJ).

Prezoj — La prezoj estas fiksitaj laŭ la jenaj
4 kategorioj de hoteloj:

Kategorio	Baza prezo	Aldono 1-lita ĉambro
luksa	1335,— gld.	165,— gld.
unuaklasa	1255,— gld.	100,— gld.
turistklasa	1155,— gld.	100,— gld.
triaklasa	995,— gld.	85,— gld.

En ĉiuj kategorioj la ĉambroj havas ban-
ĉambron aŭ duŝon.

Ni ankoraŭfoje atentigas, ke la menciitaj
prezoj inkluzivas krom la flugvojaĝo 10 tranok-
tojn en hotelo en Tel Aviv kun matenmanĝo
kaj servmono, tiel ke tiurilate oni havos plu
neniujn elspezojn.

Sparado — La ŝparsistemo, starigita por la
Kongreso en Tokio, validas ankaŭ nun por la
Kongreso en Tel Aviv. Oni povas ĉiam mal-
fermi ŝparkonton kaj sendi por ĝi rondajn
sumojn. La mono, kompreneble, restas pose-
daĵo de la ŝparanto, kaj se tiu poste ial ne
povos vojaĝi, la ŝparita sumo estos je dispono.

Anoncado — Ĉiu, kiu intencas vojaĝi al la
Kongreso en Tel Aviv per la flugkaravano de
UEA, bonvolu anonci sin kiel eble plej baldaŭ
ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam. Estas klare, ke ni povos atingi la
plej favorajn kondiĉojn, se ni baldaŭ havos
impreson pri la nombro de interesitoj. Tiuj,




*La moderna hotelo "Dan Carmel"
rigardas de sur monto Karmel ĉe Tel
Aviv trans la golfon.*

kiuj jam definitive decidis kaj antaŭpagas
20% de la vojaĝsumo, estos registritaj kiel
partoprenontoj kaj povos esti tute certaj pri
sia loko en la karavano.

Ni varme rekomendas al ĉiuj kapti la unikan
okazon vidi tiun eksterordinare interesan lan-
don. Laŭ la raportoj de s-ro Pompilio estas
jam tute klare, ke oni travivos neforgeseblan
tempon en tiu lando plena de kontrastoj, kie
je ĉiu paŝo oni renkontas kaj antikvan his-
torion kaj modernan progreson.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

esperanto
junio 1966



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

JUNAJ ESPERANTISTOJ EN ARGENTINO

La vigla J. D. de UEA en Argentino, Rubén Feldman González (sur la foto kun malhela ĉemizo), estrarano de Rosaria Esperanto Asocio, estis invitita de la ĵus fondita Esperanto-Asocio de Reconquista (urbo proks. 500 km. norde de Rosario) por la 20-a de novembro 1965. Tie s-ro Feldman prelegis en la Socia Klubo kun ĉeesto de la urbestro kaj de la ĉefo de la aera militbazo.

Antaŭe okazis kunveno por pridiskuti la principaron de Frostavallen, kaj dum la sekvinta dimanĉo la gejunuloj organizis piknikon. (foto)

S-ro Feldman estis intervjuita de Radio Goya en kvinminuta disaŭdigo. Granda entuziasmo vekigis en Reconquista por la I.L., eĉ kun apogo de la aŭtoritatoj. Por marto 1966 jam antaŭvidiĝas la fondiĝo de novaj asocioj en Cañada de Gómez kaj San Justo.

(inf: S. Patti, Rosario)

Krome ni eksciis, ke s-ro Feldman gajnis stipendion de la organizo "Experiment in International Living". Li vizitos Usonon dum julio kaj aŭgusto, kaj renkontiĝos kun TEJO-membroj tie.


S-ino E. Burgler-Jezsó festas sian 50-jaran naskiĝtagon ĉi-monate. Al ŝi, longjara gvidantino de TEJO, ni kore gratulas.

FONDIĜIS PIONIRA ESPERANTO-GRUPO EN LA URBO DE LA 22-A I.J.K., EN PÉCS

La 11-an de marto fondiĝis Pionira Esperanto-Grupo en la Pionira Domo de la urbo. Tio estas la unua memstara pionira Esperanto-Grupo de la lando. Festparolis S-ino Elizabeta Pallós, sekretariino de la Departementa Esperanto-Komitato, salutis la plej junajn kaj novajn esperantistojn, konatigis la celojn de la Esperanto-movado kaj la taskojn de la pionir-esperantistoj dum la 22-a IJK. Ili promesis ĉiun helpon al la kongresontoj.

Poste la infanoj ricevis la membrokarton de Hungara Esperanto-Asocio kaj per ĝi ili voĉdonis por la Estraro de la Grupo: (Vidu la foton) Prezidanto S-ino Elizabeta Kóczyán, direktorino de la Pionirdomo; vic-prezidantoj Mária Font kaj Stefano Feld, gelernantoj de la 8-a klaso, sekretario Ladislao Németh, kasisto Tibor Pallós. Estis elektitaj la informfakulo, bibliotekistoj, majstro pri kanto, ludo kaj humuro.

En la nomo de la Estraro de Hungara Esperanto-Junularo salutis Béla Gellén, vic-sekretario de HEJ.



OFICIALAJ KURSOJ EN BRAZILA UNIVERSITATO

En LJV de aŭg. 1965 (p. 157) ni aperigis leteron pri Esp.-kursoj ĉe la Universitato de Ceará, Brazilo. La organizanto, s-ro Cardoso, nun informas, ke la koncernaj kursoj estas rekonitaj de la Konsilantaro kaj Rektoro kiel oficialaj kursoj de la universitato. Ankaŭ la alvoko sendi librojn al la fondita Centro de Internacia Kulturo bone efikis: la biblioteko jam ampleksas 500 volumojn. La Centro nun petas:

- alsendon de esp-lingvaj revuoj pri nacia kulturo. Ofte registaroj donacas tiajn abonojn al eksterlandaj kulturaj centroj.
- interŝanĝon de studentoj kaj profesoroj
- interŝanĝon kaj donacojn de libroj en Esp.
- same pri diskoj, kulturaj objektoj, ktp.

Bonvolu peti la presitan leteron por pli detalaj informoj ĉe: s-ro Paulo Amorim Cardoso, Esperanto-kurso de la Universitato Federacia de Ceará, Rua Rodolfo Teófilo 50, **Fortaleza**, Ceará, Brazilo.

La grupo kunvenas ĉiuvendrede en la Domo de la Pioniroj kaj ludante lernas la lingvon, partoprenas en la junulara Esperanto-vivo de Pécs. Kursgvidantino kaj fondinto de la Grupo estas: Ilona Hegedüs. Adreso: Pécs, Szent István tér 17. La membroj atendas la leterojn de samaĝuloj.

(inf. B. Gellén, I. F. de HEJ)

APERIS 3-A OFICIALA INFORMILO

de la 22-a IJK. Petu ĝin de: 22-a IJK, p.f. 114, Pécs, Hungarujo.



EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj en la venontaj monatoj:

1. *Tuj ekspedi al la Centra Oficejo* en Rotterdam ĉiujn restintajn subskribo-foliojn por la Propono al U.N. — senkonsidere, ĉu ili estas tute aŭ nur parte plenigitaj. Neuzitajn foliojn oni kompreneble ne resendu. Nepre ĉiuj folioj devas atingi Rotterdam antaŭ la fino de julio ĉi-jara.

2. *Skribi apogan leteron* al la Eduka Komisiono de la Japana Parlamento, aŭ al la Komitato de Edukaj Aferoj, aŭ al la Ministerio de Edukado, pri la peticio de EPA/JEI (vidu p. 102 kaj 103). La leteroj estu nur en Esperanto, kaj estu senditaj per la adreso de Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyō-ku, Tokio.

3. *Proponi eventualajn duoblaĵojn* el la kluba biblioteko, aŭ el privataj kolektoj de grupanoj, por la nova Centra Esperanto-Biblioteko en Nürnberg (vidu majo, p. 96), p/a 85 Nürnberg 2, Welsersstr. 69.

4. *Apogi la novan grupon en Kongo* (vidu majo, p. 96), almenaŭ per letero, seeble per franclingvaj aŭ internaciaj informiloj kaj lernolibroj.

5. *Prezenti foje teatraĵeton*, ekz. la du-rolan "Amo per proverboj", facila brazila komedio de Artur Azevedo (broŝ. 3,75 gld.) aŭ iun pecon el "El japana literaturo" (19,50 gld.): "La patro revenas" de Kikuti kan (5 roloj) aŭ "Umihiko kaj Yamahiko" de Yamamoto yūzō (2 roloj).

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Larg-lantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

RADIO ROMA. Vidu programon kaj novajn ondlongojn en la maja numero.

RADIO PEKINO. Vidu novajn ondlongojn en la maja numero.

RADIO BILBAO nun elsendas la merkredan programon per ondlongo 212 m (1412 kcs).

RADIO BERN disaŭdigas la ĵaŭdan kaj sabatan programojn per ondoj 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs).

RADIO VARSOVIO. Jen la nun uzataj ondlongoj: 50.42 m (5950 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.01 m (9675 kcs).

RADIO BUDAPEST nun ĉiutage disaŭdigas esperantlingvan programon dum kvaronhoro laŭ la programo anoncita en la aprila numero. Aŭskultantoj bonvolu noti, ke sendado de leteroj al la stacio multe helpas al la daŭrigado de ĉi tiu programo. Esprimo de opinioj, sugestoj, kritikoj, kaj simplaj raportoj de aŭskultado estos bonvenaj. Notu la adreson: Radio Budapest, Esperanto-dissendoj, Budapest VIII, Hungarujo.

RADIO MADRID, per la stacio Radio Juventud de España dissendas kurson de Esperanto lunde, merkrede kaj vendrede de 21.35 ĝis 21.50 per modulita frekvenco 88.8 Mc. Hispanlingva programo pri Esperanto jam estis antaŭe dissendata de tiu stacio. Televido kontribuis al la diskonigo de la kurso.

VIZITANTOJ AL LA C.O.

La C.O. volonte akceptas vizitantojn por montri al ili la propran domon de la Asocio kaj la funkciadon de la laboroj. Ili venu prefere inter la 13-a kaj 14-a horoj aŭ inter la 17-a kaj 18-a. Ili ne forgesu, ke la geoficistoj ĉiam havas multe da laboro, kaj ili do ne restu pli ol duonan horon, se ili ne havas iun specialan temon por pritrakti.

GRAVA ATENTIGO

Pluraj oficistoj de la Centra Oficejo forestos dum la fino de julio kaj unua duono de aŭgusto pro la Universala Kongreso kaj pro libertempoj. Pro tio bv. prefere ne skribi al la Centra Oficejo dum la menciita periodo.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

La Koresponda Servo atentigis, ke el la noto sur p. 60 (marta "Esperanto") la legantoj povis ricevi malĝustan impreson pri la amplekso de la servo. En 1965 KSM respondis 783 petojn, sed tio ne signifas, ke ĝi "kunligis 783 parojn da korespondantoj", ĉar nur escepte iu petis nur unu adreson; kutime la petantoj volis akiri multajn kontaktojn en diversaj landoj. Sekve la nombro de kontaktoj ligitaj estis certe pluroble pli granda.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Ballard, s-ro B. C., Sepulveda, Usono.
Ballard, d-ro Fr. E., Reseda, Usono.
Jodozi, s-ro Franz, Düren, Germanujo.
Kästli, f-ino Ruth, St. Margrethen, Svisujo.
Mackenzie, s-ro J. L., Pretoria, Sudafriko.
Stellman, s-ro Leon, London, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

293 Kosutek, s-ro J., Aŭstralio. 294 Debrouwere, s-ro G; 295 Harry, s-ro R. L., Belgujo. 296 Goulding, s-ino Eva; 297 Hardy, s-ino R.; 298 Levy, s-ro D. S.; 299 Livett, s-ro L. G.; 300 Morton, f-ino H. R., Britujo. 301 Møller, s-ro Poul; 302 Zacho, s-ino Birthe, Danlando. 303 Korkala, s-ro O, Finnlando. 304 Peche, f-ino P., Francujo. 305 Bechtold, s-ro Ludwig; 306 Klünder, s-ro Willi; 307 Kraft, s-ro Theodor, Germanujo. 308 Ferrer Soler, s-ro Antonio, Hispanujo. 309 Spadaro Terrazzini, s-ino, Italujo. 310 Galeski, s-ro Metodi, Jugoslavio. 311 Kat, s-ro F. H., Nederlando. 312 Donovan, s-ro Walter J.; 313 Moore, s-ro V. R., Nov-Zelando. 314 Nastaj, s-ro Wacław, Pollando. 315 Hardick, s-ro N., Sudafriko. 316 Sandberg, s-ro Richard T., Usono.

DONACO POR GENERALA KASO (Gld.)

Aŭstralio: Browne, s-ino Alfreda G., 3,70.

ESPERANTO
EN RADIO

oficiala informilo
n-ro 391, 1 majo 1966

esperanto
junio 1966

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Hispanujo: Criach, s-ro Antonio, 13,92; Figueras, s-ro Johano, 7,20; Monleon, s-ro M., 4,80; Perarnau, s-ro J., 16,20. Nederlando: Kat, s-ro F. H., 20,—.

Sumo entute ricevita: 22 187,17 gld.
Sumo elspezita: 22 074,99 gld.
Saldo pozitiva: 112,18 gld.

FONDAJO CANUTO

Germanujo: Becker, s-ro G.: 1 MA-K, 1 J-MA.

FONDAJO AZIO-AFRIKO (Gld.)

Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 50,—. Svedujo: Edler, s-ro Per, 14,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Direktorino C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1966

stato je la 30-a de aprilo

Konkurso I

Lando		kvoto	poentoj	%
1.	Hispanujo	2860	3000	104,90
2.	Britujo	6691	5556	83,04
3.	Francujo	7752	6147	79,30
4. (12)	Danlando	3099	2450	79,06
5. (6)	Usono	4526	3445	76,12
6. (4)	Finnlando	3160	2345	74,21
7. (5)	Italujo	4253	3120	73,36
8.	Svedujo	7180	5000	69,64
9. (7)	Svislando	2459	1705	69,34
10. (11)	Belgujo	2055	1280	62,29
11. (10)	Nederlando	5975	3428	57,37
12. (9)	Japanujo	3965	2180	54,98
13. (14)	Germanujo	7221	3455	47,85
14. (13)	Brazilo	4142	1964	47,42
15.	Jugoslavio	5560	1750	31,47

Konkurso II

1.	Kanado	842	810	96,20
2. (7)	Sudafriko	250	240	96,—
3.	Aŭstralio	1475	1195	81,02
4. (2)	Aŭstrujo	1475	1180	80,—
5. (6)	Grekujo	270	216	80,—
6. (4)	Israelo	460	330	71,74
7. (5)	Novzelando	1481	1000	67,52
8.	Norvegujo	1755	885	50,43
9.	Islando	250	115	46,—
10.	Argentino	905	160	17,68
11.	Madagaskaro	250	30	12,—

(Vidu la regulojn sur paĝo 39. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

ANONCETOJ

Örebro — la urbo kaj gubernio. Tio estas titolo de grandformata faldfolio en Esperanto pri la guberniurbo kaj bela provinco Nerke meze de Svedujo, eldonita okaze de la 700-jara jubileo de Örebro. La faldfolio enhavas multkolorajn mapojn kaj turismajn klarigojn pri la vigla urbo kaj gubernio kun ĝiaj vidindaĵoj ĉiuspecaj. Mendu la senkoston faldfolion ĉe: Turistbyrå, Gamla Teatern, Storgatan 1, Örebro, Svedujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

1066 — Batalo de Hastings. 1966 — Amuzaĵoj Bona marborda libereco: samtempe lernu la anglan lingvon. Skribu al s-ino V. Bateman, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

Kunlaborantoj petataj el ĉiuj landoj por interŝanĝi unuataĝajn kovertojn (dek aŭ pli) aŭ kontraŭ belaj hindaj poŝtmarkoj; reciproka rekompenco laŭbezzone. Esperanta Filatela Servo, P.O. Box 604, New Delhi, Hindujo.

Ĉiu organismo konsistas el movo, kaj se oni supozas, ke la organismo mem aŭ parto de ĝi estas tio, kio spertas, oni venas al la konkludo, ke movo povas sperti movon. Ĉu tio povas esti korekta? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Filatelisto deziras interŝanĝi p.m. kun ĉiuj landoj - kontraŭ 100/200 diversaj, sendas samon el Francujo. S-ro R. Melo, La Gillière, F-42-Terrenoire, Francujo.

20 gejunuloj de la Esperanto-klubo "Verda Kolombo" deziras korespondi. Adreso: Johano Moser, ul. J. Ciuski 21, ZABRZE, Polujo.

Brazilano, kemiisto, 40-jara, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Interŝanĝe, li sendos brazilajn poŝtmarkojn. Adreso: Jacques Auguste Courbet, Praia do Flamengo, 254, Apto. 404, Flamengo, ZC-01, Rio de Janeiro, GB., Brazilo, Sudameriko.

Kolektanto de sportklubaj insignoj deziras korespondi en tuta mondo. Por sportinsignoj sendos poŝtmarkojn, bildkartojn, almetetike-tojn, insignojn, monerojn. Respondo certa. Ioan Ionescu, Gh. Coșbuc 2/36, Baia Mare, Rumanujo.

Al la kongreso en Budapeŝto per fervoja rondvojaĝbileto tra Okcident-Germanujo (1450 km nur 100 gmk.). Informojn donos: Werner Dickel, 4628 Lünen, Münsterstr. 54.

F-ino Svetlomira Velikova (20-jara studentino), Kompl. Lenin bl. 62, fam. Conev, Sofio, Bulgarujo, deziras korespondi kun geesperantistoj en ĉiuj landoj, kiuj interesiĝas pri slavaj lingvoj kaj literaturo k.c. Volonte sendos librojn k.a.

La du plej grandaj vesperjurnaloj de Svedujo publikigas senpage korespondpetojn rekte senditajn de eksterlandanoj. Expressen, Box 341, Stockholm 7; Aftonbladet, Box 157, Stockholm 7.

Kiel krei humanismon? Pri tiu temo ni prelegos kaj interparolos en FERIA HEJMO, La Kosmo, Varnhem, Svedujo, 9-16 julio. Petu informojn!

KOMPLETAJ JARKOLEKTOJ

REVUO ESPERANTO 1965 tolbindita volumo, ora surpriso, 224 + 48 paĝoj, konservindaj artikoloj.

Por MA 1965: 7,— gld.; por aliaj: 14,— gld.

LA PRAKTIKO nebindita jarkolekto, 1965: 7,50 gld.
ink. afrankon multaj ilustraĵoj.

Speciala oferto: jarkolekto 1964: 5,— gld.

Rapidu! Ambaŭ kvantoj estas limigitaj!

SINCERAN DANKON al tiuj Budapeŝtaj esperantistoj kiuj helpis min trovi de mi serĉitan hungarinon. Speciale mi dankas S-ron D-ron Stefan Bacskay, kiu, kiel eble plej baldaŭ, sukcese respondis mian ne ĉiutagan leteron. **CORNELIS L. ZWAN**, 523 East 6th So. **SALT LAKE CITY**, Utah, Usono.

VARBU NOVAJN INDIVIDUAJN MEMBROJN POR UEA! PRI LA SPECIALAJ PREMIOJ POR VARBANTOJ LEGU EN DECEMBRO 1965, P. 201 KAJ 221.

MENDU ĈE U.E.A.

la broŝuron

LA ESPERANTO-SOCIETO

Elstaraj artikoloj de la estraranoj de UEA:

Ivo Lapenna
Günther Becker
E. L. M. Wensing
Maurice Jaumotte
represitaj el "Esperanto".

Abundaj konsiloj por ĉiuj grupaktivuloj — pri informado, organizado, instruado kaj distraĵoj.


Kun aldono de modela statuto de loka grupo.

ĉ. 20 p., 22 x 17 cm.

Prezo: 1,50 gld. (6 st.)

LA NAŬZO

bind.
14,10 gld.
56,40 st.



broŝ.
11,70 gld.
46,80 st.

222 p.
15 × 21

222 p.
15 × 21

la obseda romano de

Jean-Paul Sartre

intimaj pensoj de neordinara menso
la unua okcidenta verko en la serio

ORIENTO-OKCIDENTO

Aperis 72-paĝa

LISTO DE LOKAJ ESPERANTO-SOCIETOJ

(represaĵo el la Jarlibro de UEA 1965/II)

Kompilita laŭ enketo de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado), iniciatita en 1964, la listo ampleksas 1299 lokajn Esperanto-societojn en 39 landoj de ĉiuj kontinentoj. Ĝi indikas la membronombrojn, korespondadresojn, horojn kaj ejojn de la kunvenoj. Tre utila helpilo al ĉiuj societoj, kiuj deziras vastigi siajn kontaktojn kun alilandaj grupoj, kiel ankaŭ al ĉiuj vojaĝantoj.

Prezo 2,— gld.; 8 steloj. Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

NOVA ELDONO EN LA FAMA SERIO
ORIENTO-OKCIDENTO (N-RO 6)

REGO LEAR

Bind.
16,50 gld.
Broŝ.
14,— gld.



160
paĝoj
21 x
15 cm.

Unu el la plej grandaj kaj emociaj dramoj de William Shakespeare, **REGO LEAR** nun aperis en la definitiva traduko de

K. KALOCSAY,

memore al la 350-jara datreveno de la morto de la aŭtoro. Brilkvalita teksto, bela bindo, formato de "Naŭzo", "Kalevala" ktp.


Eldono de Universala Esperanto-Asocio

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Mihail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio
de Lermontovaj
verkoj en
Esperanto

Moderna plasta
kovrilo

Prezo: 5,— gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski



368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".

Prezoj:

tuttele bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

Ĉu vi serĉas revuon

*kiu enhavas interesajn artikolojn pri
popularaj temoj,
kun grandformataj trafaj ilustraĵoj,
kiu vere "instruas kaj amuzas"?*

Do vi bezonas la monatan bildrevuon

LA PRAKTIKO

La administra maŝino de Universala Esperanto-Asocio kaj la redaktado de Wilhelm Schmid garantias regulan, akuratan aperadon kaj aktualan enhavon.

Jarabono 1966: 10,— gld. (40 steloj). Kotizu per via kutima peranto, aŭ rekte al UEA.